

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Reto kaj gazeto:
ĉu vere malamikoj?

Esperanto en
multlingva Azio

Ziko van Dijk pri la aĝo
de UEA: ĉu 100, aŭ...

Bujdosó Iván pri
“parencaj lingvoj”

Sergio Pokrovskij pri
la infero

Reinhard Haupenthal
pri landoj kaj brandoj

Andreas Künzli pri la
Fundamento

Flo Martorell pri
Esperanto kaj muziko



Aprilo
2008

№4

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №4 (162)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №4 (162).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 23 марта 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Foje, dum iu konferenco en Parizo, unu parolonto de la prezidejo, nigrehaŭta giganto el Dominiko aŭ Haitio, montris ambaŭflanken de si, nome al mi — ruso — kaj al mia kamarado el Usono, kaj komentis kun imito de hororo:

— Rigardu, kien oni min sidigis, ĝuste inter du ĝendarmojn de la mondo.



La publiko ekzamenis la du mezampleksajn polusojn de la akso de malbono, kiu nevideble perfortis la oratoron, kaj ridis aprecinte la ŝercon.

La ŝerco ne estus ja ŝerco, se ĝi malhavis sian seriozan substraton. Vole-nevole ĉiu sur tiu ĉi planedo devas atenti se ne polusojn (kaŭze de la krizo de la dupoluseco) do fokusojn de la monda energio. La baldaŭa paralela ŝanĝo sur la supraj etaĝoj politikaj en Usono kaj Ruslando provokas al kamparo rilate la gradon de tiu paralelismo. Ambaŭlande estas ago sub la flago de la demokratio, ambaŭlande la oligarĥaj plutokratoj ne donas miniman ŝancon al siaj rivaloj. Ambaŭlande fariseaj ŝablonoj donas formon kaj normon al la politika penso, tiel ke rezulte oni havas fakte certan preskaŭ kretenecon minimumon de nocioj por eterna kombinado pure retorika. Tie kaj ĉi tie la demagogio ne konas honton, ĉar tute perdis la kutimon ĉirkaŭrigardi antaŭ fari siajn naturajn aferojn: nenio kaj neniu eĉ videblas al ĝi en ĝia optika rondo.

Ekzistas tamen diferencoj sufiĉe gravaj por ne paroli pri totala diferenco. La reĝa piramido ne estas tiom kruta en Usono, kaj ĝi malpli fatale pezas la civitanojn. La plutokrataj kaj burokrataj klikoj en Ruslando pure formale — neglekte rite sekvas la demokratiajn procedurojn, kiuj mem tute ne necesas al ili en la sekreta afero de la ricevo kaj reteno de la povo. La dominaj klanoj en Usono sin streĉas por uzi la demokratian proceduron, ekster kiu ili ne povas solvi sian taskon. Alivorte, antaŭ iĝi plenpova la usonano devas plaĉi, dum lia homologo en Ruslando antaŭ plaĉi iĝas plenpova. Tiu nura ŝanĝo de sekvo aludas principan diferencon en la konstruo de la du plutokratioj. Unu ankoraŭ restas respubliko, la alia ne ĉesas esti despotio.

Koncerne la figuron de la aktuala despoto oni konsentas, ke la konstitucia formo ne iĝos baro por lia pluprospero. Tiuaspekte oni multe diskutis, ĉu li volos rompi la ĝenan formon aŭ trovos taŭga la neston de la ĉefministro. En la ligo kun tiu lasta perspektivo oni esprimis dubojn, ĉu la titolo de la ĉefministro estas sufiĉe aŭtoritata spekte por nia rangorespekta tradicio. Ĝis nun ĉiuj konataj al mi komentistoj rezonas pri la ŝancoj de tiu modelo, kiu bizare reprezentas nian ŝtatan simbolon, dukapan aglon kronportan, kun plena ignoro de certa paragrafo de la ruslanda konstitucio, kiu permesas radike simpligi la situon. La paragrafo sonas tiel: okaze de la eksoficio de la prezidento aŭ okaze de lia stabila nekapablo plenumi siajn taskojn liajn funkciojn realigas la ĉefministro. Ĝuste ĝis la reelektaj kaj inaŭguro de la nova prezidento, kiu rajtas jam esti la aktuala ĉefministro.

Mi ne volus nomi prognozo tiun rimarkon koncerne la eblojn de superpaso de la altadministra dukapeco. Kaj mi preferas ne esti profeto koncerne la “stabilan nekapablon” kiu povas ja esti grava malsano aŭ eĉ io pli.

Alen Kris

La kovrilpaĝa foto de Joaquim Mariano (Brazilo) montras koncertan programeron el la 5a Azia Esperanto-Kongreso.

Reto kaj gazeto: ĉu malamikoj?

Renkonte al la unua mondkongreso de esperantistoj-jurnalistoj, kiu okazos fine de majo en Vilno, ni proponas ĉapitron el la broŝuro *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro* de Aleksander Korĵenkov. La teksto estas iom ĝisdatigita.

La progresanta komputil-tekniko efikas dumaniere al nia gazetaro.

Unuflanke, la redaktado kaj prespretigado fariĝis pli facila kaj pli malmultekosta ol en la antaŭkomputila epoko. Pli da gazetoj povas aperi, kaj pli da amatoroj kapablas teknike fari gazeton. Se temas pri la reto, ĝi ebligas rapidan internacian kunlaboradon, tujan ricevadon de informoj kaj fotoj. Oni povas redakti la gazeton en unu lando, kie estas bona redaktoro, kiu presi ĝin en alia lando kun malpli kosta presejo aŭ pli favora poŝta tarifo. Ekzemple, la porjunula revuo de UEA, *Kontakto*, estas administrata en Nederlando, redaktata en Ukrainio (antaŭe en Usono) kaj presata en Pollando.

Ĉi tion faras ankaŭ la Kooperativo de Literatura Foiro, kies gazetoj estas redaktataj en diversaj landoj, sed presataj en Bulgario. *La Ondo de Esperanto*, redaktata en Ruslando, uzas malpli koston presadon kaj ekspedadon en Pollando.

Aliflanke, la reto ebligas disvastigi informojn pli rapide kaj malpli koste ol la tradicia gazetaro. Pro la malapero de *Eventoj* kaj de *El Popola Ĉinio* kelkaj ekparolis pri baldaŭa morto (aŭ enretigo) de la papera Esperanta gazetaro, ĉar la ret-informiloj sufiĉas. Tamen tio ne okazis. En aprilo 2007 neniu el la ses redaktoroj de la plej gravaj Esperantogazetoj, intervjuitaj de *La Ondo* nomis la konkurencon rolon de la reto inter la problemoj (sed la poŝtaj tarifoj estis nomitaj de kelkaj).

Ankaŭ la nacilingva gazetaro kontentige fartas. Iam oni parolis, ke la radio elpuŝos la gazetojn, ĉar ĝi informas pli rapide, poste pri la televido, kaj nun pri la reto. Sed la reto, simile al la radio kaj televido, ne elpuŝas la tradiciajn gazetojn. Ilin pli damaĝas ne la reto, sed senpagaj reklamgazetoj, kiuj aperigas ne nur reklamojn kaj TV-programojn, sed ankaŭ artikolojn, amuzajojn kaj eĉ poemojn.

La radio kaj televido pruviĝis bona rimedo por subteni la gazetaron, ekzemple, per “trarigardo de la gazetaro”. Ankaŭ la reto pli helpas ol malhelpas.

En Esperantujo, kie la radio kaj televido estas malpli gravaj ol en la “Granda Mondo”, la helpa rolo de la reto bone rimarkeblas. En dissendolistoj kaj forumoj estas prezentata la enhavo de gazetoj. Multaj gazetoj havas senpagajn ret-ejojn kun novaj kaj malnovaj artikoloj.

Monato kaj *La Ondo de Esperanto* ofertas aboneblajn pdf-versiojn, sed la nombro da ret-abonantoj ne estas granda malgraŭ malaltaj kotizoj — la esperantistaro klare preferas la tradiciajn gazetojn. Lastatempe aperis nova fenomeno: iuj legantoj revenas al tradicia papera abono post provado de la reta. (Ekzemple, en BET-43 en Ŝiauliai belga ret-abonanto alpagis por la papera abono de *La Ondo*, ĉar li “ja elprintas la tutan revuon post la ricevo de ĝi en la formato pdf”.)

Tute freŝdate, *La Ondo* lanĉis podkastan servon. Estus naive pensi, ke iuj malabonos la revuon, ĉar ili aŭskultas podkaste kelkajn tekstojn el ĝi, sed jam kelkaj “podaŭskultantoj” ekinteresiĝis pri la papera revuo.

La rapideco de informado estas nur unu el la necesoj en la ĵurnalismo. Sed estas bezonataj ankaŭ aliaj, kiujn la reto mem ne donas. Elektado de informoj, redaktado, provlegado, grupigo de informoj, verkado de (sub)titoloj kaj

foto-subskriboj, preparado kaj lokado de ilustraĵoj estas same malfacilaj en la reto, kiel en la papera gazetaro.

Ĝis nun temis pri informoj, pri aktualajoj, sed por multaj tekstoj la rapideco estas malpli grava. Artikoloj ĝeneralaj kaj fakaj, prilingvaj studoj, recenzoj, poemoj kaj noveloj povas aperi en paperaj gazetoj iom malpli frue ol en la reto, sed pli bone pretigitaj.

Ĉiuokaze, ne pro la konkurenco de la reto ĉesis *Fonto* kaj *Iltis-Forumo*, kiuj malhavis urĝajn informojn.

Paradokse, pro la reto en nia gazetaro suferis ne novaĵ-rubrikoj, kiel iuj misprognozis, sed diskut-paĝoj, kaj en esperantistaj dissendolistoj novaĵoj estas malpli multaj ol polemikaĵoj, dum en la tradiciaj gazetoj estas male.

Gravas, ke la paperaj gazetoj (almenaŭ la plej bonaj el ili), danke al redaktado kaj provlegado, prezentas bonan lingvaĵon kaj, pretercele, havas lingvoinstruan efikon. Sed la reta lingvaĵo (ne nur en Esperanto, sed ankaŭ nacilingve) pro nesufiĉa aŭ tute nenia redaktado ofte estas fuŝa.

La reto ne estu prezentata kiel malamiko de nia gazetaro, kiu restas — apud la kongresoj, kluboj, libroj — grava parto de la esperantista vivo.

Aleksander Korĵenkov

La novaj teknikaj inventoj je la servo al la tradicia gazetaro — Halina Gorecka podkaste prezentas la martan kajeron de *La Ondo*. (Fotis Aleksej Korĵenkov)





5a Azia Kongreso. Ekskurso en Majsoro, eksa reĝa palaco

Esperanto en Multlingva Azio

“Nenio estas pli internacia ol Esperanto”, — diris Muhammad Mahbul Huq en la Fermo de la kvina Azia Esperanto-Kongreso, okazinta 11–15 feb en Bengaluro (Barato) kun la ĉeftemo *Esperanto en Multlingva Azio*.

Efektive, la partoprenantoj venis el 29 landoj, el kiuj 13 aziaj kaj 16 eksteraziaj. En la antaŭaj AKoj, azianoj venis nur el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj malmulte da aliaj landoj, sed en tiu ĉi Kongreso partoprenantoj venis el Bangladeŝo, Barato, Ĉinio, Irano, Israelo, Japanio, Koreio, Mongolio, Nepalo, Pakistano, Srilanko, Taĝikio, Vjetnamio — preskaŭ el ĉiuj landoj, kie Esperantomovado ekzistas.

Sed, malgraŭ la rekorda internacieco, la plej granda Azia Kongreso restis tiu en Ĉinio en 1996 kun 585 aliĝintoj el 18 landoj. La nombro da aliĝintoj al la Bengalura Kongreso estis nur 254, kaj tiu da partoprenantoj estis 178. Pro vizo-problemoj venis nur malmultaj ĉinoj kaj neniu el Pakistano (krom unu loĝanta en Kanado). LKK klopodis pri la vizo, sed tre bedaŭrinde tio ne efikis.

La kongresejo estis Kunvena Centro de Nacia Instituto pri Mensa Sano kaj Neŭra Scienco. Ĉiuj rajtis ĝui la bankedon, tagmanĝi kune kaj teumi dufoje po 30 minutoj. Dank’ al la spaco kaj la libera tempo ni povis multe amikiĝi unu kun la aliaj laŭ la barata tempo. En la koridoro partoprenantoj ĝuis japanajn paperfaldarton, kaligrafion, abakon kaj surpoŝtkartan desegnadon.

La Nacia Vespero konsistis el belegaj tradiciaj dancoj fare de profesiaj dancistoj, kaj la internacia Arta Vespero

el amatoraj kantoj, muzikoj, dancoj kaj aŭkcio fare de la partoprenantoj.

Okazis diversaj fakkunsidoj (entute 33) de la fakaj, konversaciaj, artaj, politikaj, edukaj, lingvistikaj ĝis kunvenoj de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado).

La Inaŭguron prezidis Hori Jasuo, sed la Fermon LEE Jungk-kee, la nova prezidanto de KAEM. Wang Ruixiang (Ĉinio) kaj Tran Quan Ngoc estas nun vicprezidantoj kaj P.V. Ranganayakulu (Barato) sekretario de la nova KAEM.

En la Fermo mongola reprezentanto, Enkhee Chimedtseren, invitis al la 6a Azia Esperanto-Kongreso, okazonta en junio 2010 en la ĉefurbo de Mongolio, kaj la nova prezidanto, Lee Jung-kee, laŭvoĉe adresis sian laborplanon kaj deklaris la fermon de la kongreso.

Hori Jasuo

Danio: lingvodefenda debato

(Landa Agado) 21 feb Dana Esperanto-Asocio en kunlaboro kun la dana Asocio de Gepatra Lingvo okazigis debatkunvenon en la sidejo de la dana UN-Asocio. La debato pri la enlanda kaj eŭropa lingva politiko estis tre vigla. UN-Asocio disdonis sian deklaron pri la graveco defendi la gepatran lingvon, kaj DEA kune kun la gepatralingva asocio disdonis kuman deklaron pri la graveco de lingvaj homaj rajtoj kaj lingva diverseco.

Ambaŭ gravaj asocioj promesis estontan kunlaboron rilate al defendo de gepatraj lingvoj. Ni jam interkonsentis kun la Asocio de Gepatra Lingvo aranĝi lingvan festivalon en septembro.

Ileana Schröder

En kunveno de slovenaj NROj

Slovenaj neregistaraj organizoj, kiuj aktivas por EU dum la slovena prezidado kun subtemo “Interkultura dialogo”, kunvenis 12 feb en Ljubljana.

Enkonduke parolis reprezentantoj de slovena buroo de la Eŭropa Parlamento (Maja Kezunoviĉ-Krašek), de slovena buroo de la Eŭropa Komisiono (Mihela Zupanĉiĉ), de Ministerio por kulturo (Sonja Kralj Bervar) kaj de Buroo por informado de la Registaro (Anže Logar). Poste oni prezentis planojn kaj konkretajn projektojn en la jaro de interkultura dialogo.

Mi prezentis mallonge EEU-konferencon *Interkultura Dialogo kaj komunikado* kaj tion, ke EEU eldonas apartan informilon pri slovena prezidado en Esperanto kaj pluraj malgrandaj lingvoj. Mi konkludis ke malgrandaj landoj, inter kiuj Slovenio, tro atentigas grandajn lingvojn (oficiale oni uzas krom la slovena nur la anglan kaj la francan) kaj ne la malgrandajn, kaj pro tio ili ne miru, ke ankaŭ aliaj ne atentis pri ili. Nun la slovena lingvo estas grava, sed post kvin monatoj ĝi denove estos sensignifa. Se ili atentus pli pri malgrandaj lingvoj, ankaŭ aliaj atentus estonte pri ili. Mi distribuis materialojn kun la deklaro de la konferenco kaj mia libro en la slovena *Eŭropo, vi baldaŭ mortos*.

Reprezentanto de la Eŭropa Parlamento informis, ke ili povas senpage disponigi al Neregistaraj Organizoj sian salomon.

Zlatko Tišljar

Lingvotago en Beogrado

25 feb en beograda Internacia Kultura Centro YUBIN, beogradaj esperantistoj, membroj de la societoj *La Suda Stelo* kaj *Radomir Klajiĉ* preparis vesperon de lingvoj. Ĉeestantoj povis aŭdi tekstojn kaj poemojn en Esperanto, serba, rumana, hungara, slovena, armena, cigana, makedona, slovaka kaj hispana lingvoj. La programon gvidis Nedeljka Ložajiĉ, prezidantino de LIBE kaj de *La Suda Stelo*.

Ĉiuj ĉeestantoj ĝuis la neordinaran diverslingvan programon, kiu daŭris unu horon. Ili poste rigardis ekspozicion de akvareloj de juna pentristo Milan Milosavljeviĉ. Fine estis akceptita propono de Tereza Kapista, A-komitatano de UEA, organizi, kunlaborante kun la Internacia Kultura Centro, subĉielan lingvan festivalon en majo aŭ junio ĉijare.

Dimitrije Janičić

MES — kutima kaj ĝuinda

Dum la unuaj ok martaj tagoj en Agay, Saint Raphael (Suda Francio) okazis la 2a Mediteranea Esperanto-Semajno kun 90 partoprenantoj el sep landoj. Ĉi-jare, la tradicia Semajno estis dediĉita al Claude Piron, kun Jean-Pierre Boulet kiel la ĉefparolanto. La programo estis kutima: prelegoj, ekskursoj kaj kursoj tri-gradaj fare de Mariroza kaj Pascal Vilain, Monique Arnaud kaj Josée Lafosse. Sed anstataŭ listigi la programerojn ni lasu la parolon al unuafoja partoprenantino, 23-jara rumanino Bianca Muresan:

«Jen mia plej ĝuinda renkontiĝo kun la franca esperantistaro! En la daŭro de sep tagoj la aventuroj pliriĉigantaj sekvas unu post la alia, tute nature, kvazaŭ kiel antaŭkonsentite.

La kurso fantazifavora ricevigas la plej diversajn interpretaĵojn kaj neniam ĉesas la fluo de la alvenantaj novaj ideoj. Mi ĝuas la rakontojn. Mi konatiĝas kun verkoj de Claude Piron, la sukcesplena pioniro de nia movado. Oni pledas por Esperanto per ĉies koro, farante promenadojn en la montaro Esterel, en la lando de mimozoj, en Dramont, aŭ laŭ la marbordo. La Babela Turo iĝas fabelo de antikva epoko! La plej alta ŝtupo de la komunikado monda estis jam atingita! Ĉiuj interkompreniĝas per la lingvo de Zamenhof! La egaleco estas la bazo de la renkonto esperanta!

Internacia vespero kun teatraĵo amuzas je tri lingvoŝtupoj (laŭ la kursniveloj) kaj la tradiciaj popoldancoj kun versioj pri la sveda popoldanco kaj rumana popoldanco unuiĝas la partoprenantaro. Vera vojo al monda feliĉo!



Ĉiuj hejmeniras kun ĝoja koro pro granda progreso dum ĉi tiu staĝo, dankante al sinjorino Piron pro la subteno al Esperanto, tra sia edzo. Kelkaj verkis admirindajn poeziaĵojn, kiel sinjorino Gabrielle el Bretonio, kiu varme impresis nin per siaj versoj.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj, kiuj favoris min per la interkomunikado kaj tiel permesis malferman koron!»

Monique Prezioso



Espoo: Tuomo Grundström kaj Anna M. Ritamäki — la nuna kaj la eksa prezidentoj de EAF. (Fotis Harri Laine)

Finlando kun nova prezidento

Vintraj Tagoj kaj jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazis 8–9 mar 2008 en la urbo Espoo, la dua plej granda urbo de Finnlando, apud la ĉefurbo Helsinko, kun 51 partoprenantoj.

En la programo de la tagoj estis sabate du interesaj prelegoj: Jouko Lindstedt prelegis pri lingvoj minacataj kaj mortontaj, kaj Patrik Austin pri novaĵoj de lingvoinstruado. Vespere la partoprenantoj rememoris la pasintan jubilean jaron de EAF kaj konatiĝis kun donacoj kiujn la Asocio ricevis por la 100-jariĝo. Jouko Lindstedt rakontis pri la Akademio de Esperanto, kaj Päivi Saarinen pri historio de UEA. La someraj eventoj, ekzemple, la komuna vojaĝo al UK en Roterdamo kaj la somera kurso en Valamo, estis pritraktitaj.

Dimanĉe ni havis interesan rondveturon en Espoo, kaj haltis kompreneble en Esperantotie (Esperantovojo), kie antaŭe situis domo de konata esperantisto Vilho Setälä. Ni ankaŭ vidis de ekstere la kongresejon *Dipoli* de la 54a UK en 1969. Gvidis lerte la rondveturon Harri Laine.

En la dimanĉa jarkunveno la nova estraro de EAF estis elektita. Ĝia konsisto estas jena: prezidento Tuomo Grundström; vicprezidento Päivi Saarinen; sekretario Tiina Oittinen; estraranoj Börje Eriksson, Taneli Huuskonen, Jukka Laaksonen kaj Paula Niinikorpi (nova); vicestraranoj Teuvo Alavillamo (nova), Markku Saastamoinen (nova) kaj Vilorg Teräväinen (nova).

Tiina Oittinen

Fervoja semajno en Rumanio

Plejparte bela kaj sunbrila vetero akompanis la 49an Internacian Fervojistan Esperantan Skisemajnon (IFES) 23–29 feb 2008 en Braŝovo en Rumanio, kiun denove modele aranĝis la prezidantino de la Rumana Esperanto Fervojista Asocio, Rodica Todor.

Sabate (23 feb) la partoprenantoj, venintaj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario kaj Rumanio, havis en amika etoso interkonan vesperon en hotelo *Coroana*, kie pli multaj partoprenantoj ankaŭ loĝis.

Dimanĉe ni kun ĉiĉerono promenis tra la historia centro de Braŝovo, kaj vizitis la fortikaĵon kun la fama mezepoka restoracio sur monto supre de la urbo. Vespere dum tradicia karnavalo en *Coroana* oni admiris belajn kostumojn de la partoprenantoj, amuzis sin kaj dancis.

Lunde okazis akcepto ĉe la ĝenerala direktoro de la fervoja distrikto Braŝov, inĝ. Dian Ionel, dum kiu oni ricevis informojn pri fervojaj novaĵoj en la distrikto kaj diskutis pri evoluo de la fervojaj trafiko kaj transporto.

Poste ni komune vizitis la montaran Poiana Braŝov, promenis en la bela sunlumigita pejzaĝo kaj tagmanĝis en la tipa rumana restoracio. Vespere okazis renkontiĝo kun membroj de la loka Esperanto-klubo *Amikeco* en la kulturdomo *Reduta*.

Ankaŭ en aliaj tagoj okazis interesa programo, eĉ kun pli frue neanoncitaj surprizoj por la partoprenantoj. Emocia estis vizito de la fama ortodoksa monaĥejo Brâncoveanu en Sâmbăta de Sus, kie ni krom trarigardo estis akceptitaj de la esperantisto, denaske blinda monaĥo Părintele Teofil Părăian, kiu konas kelkajn eŭropajn lingvojn, diktante verkis 31 librojn kun religiaj temoj.

Okazis vizitoj ankaŭ de la ĉampan-fabriko kaj sledokonkurso en Azuga, de la mezepoka urbo Sighișoara, de Biertan kun mezepoka fortikaĵo, de la Arta kaj Etnografia muzeo en Braŝovo.

Interesaj estis ankaŭ vesperaj prelegoj, inter ili prelego de Martin Stuppniĝ pri biero kaj informoj de la IFEF-ĉefkomitatano Jindřich Tomášek pri la 60a kongreso de IFEF okazonta 17–24 maj 2008 en Poznań, dum kiu oni inaŭguros memorŝtonon de IFEF.

La Prezidanto de la Urba Konsilantaro de Braŝovo, Aristotel Căncescu, en la lasta tago venis al la IFESanoj, rakontis pri la urbo kaj disdonis galantojn al la virinoj okaze de la 1a de marto, laŭ la rumana kutimo.

Jindřich Tomášek

Svislando: politika subteno

La kandidatigo de UEA por la Nobelpremio fare de svisaj parlamentanoj en novembro 2007 havas pozitivajn sekvojn en Svislando. Aperis politikistoj kiuj deziris fari ion por Esperanto.

21 feb 2008 leĝpropono estis submetita en la kantono Neŭŝatelo kun subskribo de 27 parlamentanoj el diversaj partioj. La propono listigas interalie tiujn punktojn: ŝtatnivele informadi pri Esperanto, utiligi ĝin en diversaj oficialaj dokumentoj (tradukoj), en turismo (prospektoj), ebligi kaj subteni la instruadon de la lingvo laŭ nedeviga formo.

Larĝskala dissendado de gazetara komunikado sciigis la svisajn amaskomunikilojn pri la evento.

Stefano Keller

(Laŭ HeKo temas ne pri leĝpropono, sed pri propono de rezolucio. La iniciatinto de tiu rezolucio estas Alain Bringolf, prezidinto de la svisa komunista partio.)

Pri esperantisto mortkondamnita

15 mar Komitato Armand partoprenis per propra reprezentanto en la jarkunveno de la Amikaro de N.I. Sequoyah — neesperantista asocio, registrita en Svislando, kiu arigas tridekon da bonvoluloj klopodantaj helpi al Billy Waldon, la esperantisto parte el indiana deveno, kiu dum dek ses jaroj sidas en la mortoalo de kalifornia prizono.

La Amikaro laste jarkunvenis en 2004: intertempe aktivadis ĝia estraro, sub la gvido de Claudio Marinucci. La nunan jarkunvenon karakterizis la raporto de d-ino Constance de la Vega, profesorino pri internacia juro en la universitato de San-Francisko kaj estrarano de la usona asocio *Advokatoj por Homaj Rajtoj*. Ŝi detale raportis pri la peticio liverita en februaro 2007 cele al apelacia proceso pro malrespekto de homaj rajtoj okaze de la unua proceso.

La reprezentanto de Komitato Armand kontribuis al la diskuto per kelkaj informoj, nekonataj al la ĉeestantoj pro ne scipovo de nia lingvo, disdonis numerojn de *Heroldo de Esperanto* kun artikoloj pri Billy Waldon kaj montris la lumdiskon kun la filmo de Liliana Cavani *La pelle*, kie Billy Waldon havas tre etan rolon. Okazis ankaŭ interkonsiliĝo pri la eventualaj konsekvencoj de la moratorio pri mortpuno, al kies kampanjo aliĝis la Esperanta Civito.

HeKo



Ĉefministro alte protektos

26 feb la ĉefministro de Litovio Gediminas Kirkilas (sur la supra foto) akceptis prezidanton de Litovia ĵurnalista Asocio Dainius Radzevičius kaj prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas.

Dum la interparolado temis pri la tutmonda kongreso de ĵurnalistoj-esperantistoj okazonta fine de majo 2008 en Vilno. La ĉefministro konsentis esti Alta Protektanto de la kongreso kaj promesis veni al la inaŭguro de la kongreso, se lia okupiteco tiutempe permesos. Ankaŭ estis promesita solida monsumo el la Registara rezerva fondaĵo por la ĵurnalista kongreso (ĝi estos anoncita kiam tio realiĝos per Registara decido).

Estas notinde, ke Gediminas Kirkilas, tiam kiel prezidanto de parlamenta komitato pri eksterlandaj aferoj, akceptis 14 maj 2002 tiutempan prezidanton de UEA Renato Corsetti, vicprezidanton de UEA Lee Chong-Yeong kaj prezidanton de LitEA, Povilas Jegorovas, lige kun okazigo de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno.

Povilas Jegorovas

332 studentoj eklernis Esperanton

332 koreaj studentoj komencis lerni Esperanton en la unua semestro de la lernojaro 2008. En la tri universitatoj, Korea fremdlingva universitato (en Seulo kaj Yongin), Universitato Dankook (en Seulo kaj Chonan) kaj Universitato Wonkwang (en Iksan) Esperanto estas instruata oficiale kiel unu el la studobjektoj.

Post unusemestra lernado (1 mar – 15 jun) ili ricevas du notojn. Al la finlernantoj, Korea Esperanto-Asocio donas ĉarman atestilon, kiu estas alloga por kursanoj. Dum la lecionoj la studentoj provas paroli en Esperanto per Skajpo. La Skajpa adreso de la kursgvidanto: “leejungkee”. Reagoj estas bonvenaj.

Lee Jung-kee

Nepalo: lern-instiga prelegaro

Esperanto kaj gepatraj lingvoj estis la ĉefa temo de la preleĝprogramo ĉe Valley Educational Centre en Bagbazar (Kathmando, Nepalo), kiun 15 mar 2008 partoprenis 33 profesoroj, studentoj kaj bankoficistoj.

Mi, s-ino Indu Thapaliya, s-ro Mukunda “Pathik”, s-ro Jakob Nordfalk kaj s-ro Shree Prasad Pokharel faris preleĝojn pri diversaj aspektoj de Esperanto.

Unue, s-ino Indu Thapaliya prelegis pri la naskiĝo de Esperanto kaj la Azia movado. Jakob Nordfalk sekvis ŝin, parolante pri la utileco de nia lingvo, ekzemple kiel ŝlosilo al la Pasporta Servo. Li ankaŭ klarigis kiel Esperanto helpas lerni aliajn lingvojn.

Mi mem penis pritrakti lingvojn historie ekde la antikva periodo de Grekujo. Mi citis libron de Umberto Eco, *Search for the Perfect Language*, kaj diskutis kelkajn modernajn teoriojn de lingvistoj, ekzemple Ferdinand de Saussure, kiu atentigis ke vortoj kaj objektoj ne havas naturan rilaton, kaj ke sekve ne ekzistas proprasence natura lingvo. Ĉiuj gepatraj lingvoj estas kreitaj de homoj. Esperanto estas pli facila ol aliaj lingvoj pro tio ke ĝi estas pli logika. Esperanto ne plu estas vere artefarita lingvo ĉar ĝi estas uzata nun pli ol 100 jarojn de multaj homoj. Kaj mi provis ankaŭ klarigi, surbaze de teorio de Benjamin Lee Whorf, ke la lingvo spegulas la penson, kaj ke tiu ĉi do pli gravas.

Mukunda “Pathik” rakontis la historion de la Esperanto-movado en Nepalo. Li emocie priskribis kiamaniere li renkontis la instruiston de Esperanto Joakim Verdin, kiu instruis Esperanton en la lingva instituto Quest, kies direktoro li estis. Li plue klarigis kiel utiligi la lingvon.

Shree Prasad Pokharel diris, ke Esperanto forte aktivigas la cerbon kaj do donas ŝancon al individuoj utiligi siajn talentojn. Li ankaŭ rakontis pri sia vojaĝo al Japanio.

Post la preleĝoj ĉiuj volis eklerni la lingvon, kaj mi planas instrui kun helpo de aliaj geamikoj. Ni planas disdoni materialojn al tiuj, kiuj ne povas pagi, uzante monon de Apsana-Fondaĵo kiun ni kolektis per vendado en la Azia Kongreso en Bengaluro.

Ni dankas al Biswambar Ghimire, kiu disponigis al ni ĉambron por la preleĝoj kaj promesis ke ni rajtos uzi ĝin por la instruado.

Bharat Kumar Ghimire



Jam unujara protestado

Ili pace protestas ĉiutage ekde la 26a de aprilo 2007, eĉ en Esperanto!

Ĉiutage ekde la 8a matene ili estas kun siaj aviztabuloj antaŭ la sidejo de la Monda Organizo pri Sano (MOS), kaj ili restos tie ankoraŭ monatojn kaj probable jarojn, ĝis ili estus aŭskultataj! Tiuj reprezentantoj de multaj internaciaj Ne-Registaraj Organizoj (NRO) petas:

— ke MOS ĉesigu (aŭ ŝanĝu) la akordon, kiun ĝi kontraktis en 1959 kun la Internacia Atomenergia Agentejo (IAA), kies komisiono estas tutmonde disvolvi la uzon de la atomenergio. Tiu akordo malpermesas al MOS publikigi ajnan studaĵon, se IAA ne konsentas!

— ke MOS reprenu en siajn manojn ĉiujn problemojn, kiuj rilatas la uzon de la atomenergio kaj nia sano;

— kaj ke, finfine, ĝi akceptu publikigi la veran bilancon de la eksplodo de Ĉernobyl la 26an de aprilo 1986, eĉ se tio malplaĉus al IAA, kiu ĝis nun estas juĝanto kaj juĝato.

Ekzemple, kiam tre multaj scienculoj kaj NROj pensas, ke la vera bilanco estos inter 50 kaj 200 mil mortintoj, IAA (do MOS!) sciigas maksimume 4 mil mortintojn (postsciigis nur kelkajn dekojn dum multaj jaroj!). Plie, permesi, eĉ devigi la loĝantojn resetli en radioaktivpoluaj regionoj estas krimo.

Konkludas la manifestaciantoj: se, ekzemple, en via lando vi havus la povon kaj la moralan respondecon bilanci la antaŭvideblan nombron de mortintoj ligitaj kun la cigaredfumado, ĉu vi petus la cigaredfabrikistojn, por ke ili mem taksu la nombron de mortintoj pro la cigaredoj, kiujn ili vendas? Kompreneble la rezultoj estus, ke ĉio iras bone en la pli bona mondo, kaj ke ĉiuj devus fumi por esti pli feliĉaj!

Gerard Brisoux

Islamo por Interkultura Dialogo

Estis starigita **Islama Esperanto-Asocio por Interkultura Dialogo**, kies celo estas grupigi islamajn esperantistojn, kiuj kredas je la neceso dialogi kun homoj el aliaj kulturoj kaj aliaj religioj, volas disvastigi Esperanton kiel rimedon por ĉi tiu dialogo kaj volas konigi al la parolantoj de Esperanto la islaman kulturon en la monda lingvo Esperanto.

Ĉiu interesiĝanto rajtas peti la statuton ĉe la prezidanto, Saeed Ahmad, kaj oni jam povas membriĝi per pagado de kotizo de 5 eŭroj al la UEA-konto "ieas-x" de Islama Esperanto-Asocio. Validas la kutimaj pagomanieroj al UEA (pĝ 36 de la *Jarlibro* 2007). Indiku kiel pagocelon la jenan: "Kotizo 2008 IEA".

Samtempe bonvolu sendi vian nomon kaj adreson al la sekretario de IEA: Saidnabi Saidilhomzoda saidnabi@mail.ru.

Saeed Ahmad
prezidanto de IEA

Palmodimanĉa beno en Esperanto

Ĉiujare dum la Palmodimanĉo antaŭ la fasado de la pasiono de la preĝejo Sankta Familio de Barcelono, konstruita de la fama arkitekto Antoni Gaudí, pastro benas palmfoliojn.

La 16an de marto, ja la Palmodimanĉo, membroj de esperantaj grupoj de Barcelono — grupo *Aŭroro*, Katalunaj Fervojistoj, Barcelona Esperanto-Centro, KAE, k.a. — starigis stangojn kun la naŭ literoj de la vorto *Esperanto*, same kiel italaj esperantistoj en la Vatikana Placo. La pastro benis la palmojn uzante diversajn lingvojn, inter ili ankaŭ Esperanton.



Multaj personoj demandis kaj komentis pri la lingvo, kaj informoj poste aperis en televida kanalo, kaj en la ĵurnalo *La Vanguardia*.

Martí Guerrero

Trovu La Ringon Perditan

(**Ret-info**) Antaŭ kelkaj tagoj lanĉiĝis mondskala ludo, pri kiu oni fervore diskutas en interreto. Ĝi daŭros pli malpli ses monatojn, kaj ŝajnas esti rek-lamaĵo por la olimpiaj ludoj en Ĉinio. Ŝajnas ankaŭ, ke McDonalds sponsoras la ludon.

La kvin diverslandaj personoj en la rakonto vekigis je la komenco de la historio kun mistera surbraka skribaĵo en Esperanto *Trovu la ringon perditan*.



Ŝajnas, ke oni elektis Esperanton pro tio pro ĝia kongruco kun la celoj de la olimpiaj ludoj. Tio estas granda okazo reklami pri la utileco de Esperanto al tre internacia celgrupo, eĉ se nur kadre de ludo.

Tim Morley

Preskaŭ centprocente ruslingva

(**Esperanto-rus-informoj**) En la festivalo EoLA-20, kiu okazis 20–25 feb 2008 en ripozejo apud Ĉeboksari (Ĉuvaŝio), partoprenis ĉ. 60–70 personoj. Plejparte tio estis ĉeboksara E-junularo, sed ĉar ili malofte aperas en aliaj E-aranĝoj, ankaŭ tio estis bona atingo.

Pro la abundo de komencantoj, i.a. inter la organizantoj, la programo estis preskaŭ centprocente ruslingva. Sed kun gravaj esceptoj, kiel koncertoj kaj teatraĵoj.

Tre interesan koncerton prezentis Grigorij Arosev (Moskvo), kiu malgraŭ kelkajara malapero el la aktiva movada vivo ne ĉesis evolui kiel artisto. Ankaŭ Maria Kočetkova, kiu pro la familia situacio longe ne partoprenis en niaj aranĝoj, prezentis unuhoran koncerton, kiu konsistis el ŝiaj malnovaj kantoj, kaj parte el la ruslingvaj kantoj.

La kerno de la festivalo estis laŭgrupa preparado de spektakloj laŭ popularaj fabeloj kaj legendoj. La spektakloj estis preparataj tre intense, kun abunda uzo de teatraj kostumoj kaj muzika akompano.

Andrej Grigorjevskij

Ekspozicio en Madrido

De 11 feb ĝis 8 mar en la madrida komerca centro Gran Vía de Hortaleza eblis viziti la bibliografian ekspozicion *Esperanto, de la creación individual a la creación colectiva*. Ĝin organizis Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kadre de sia pli ĝenerala projekto *Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo*, kiu disvolviĝos dum 2008 kaj 2009 por celebri la Internacian Jaron de la Lingvoj, la Eŭropan Jaron de la Interkultura Dialogo kaj por kunmemori la centan datrevenon de UEA.

La elektitaj libroj montris, kiel persona projekto, la individua kreaĵo de Zamenhof, iĝis tutmonda kultura movado danke al la kolektiva laboro de beletristoj kaj parolantoj de la lingvo.


Ĉio organiziĝas laŭ tri aksoj:

1. *La individua kreado: Zamenhof, iniciatinto de esperanto.* Ĉi tie oni montris librojn kaj alispecan materialon pri Zamenhof kaj la originoj de la lingvo: biografioj, fotoj ktp.

2. *La kolektiva kreado: literaturo, evoluilo de la lingvo.* Ĉi branĉo reliefigis la gravecon de literaturo en la evoluo de esperanto ĝis plena maturiĝo, de la unuaj tradukoj de Zamenhof ĝis la nunaj tendencoj.

3. *La kolektiva kreado: esperanto-parolantoj, forĝistoj de kulturo.* Vera enradikiĝo de la lingvo ŝuldiĝas al ties parolantoj. Vizitantoj vidis en la tria fako ampleksan kolekton de revuoj kaj diskoidoj, kaj eldonitaĵoj de la plej gravaj esperanto-institucioj, ĉefe de UEA, pri kies ĉi-jaraj centjariĝo kaj kandidatigo al Nobel-Premio pri Paco ni ankaŭ informis. Fine, kelkaj kuriozaĵoj — esperanto en kino kaj libro en brajlo — kaj areto de lernolibroj kaj vortaroj.

Sabate tuttage kaj vendrede vespere, funkciis en la Komerca Centro informangulo zorgata de esperantistoj, kie eblis aŭskulti muzikon, aĉeti lernolibrojn kaj ricevi la unuajn lingvonociojn. Ni taksas la kunlaboron kun la Komerca Centro tre profita, ĉar ĝi ne nur ebligis la muntadon de ekspozicio kaj budo, sed ankaŭ pagis la diversajn informilojn.



Krome, ĉiutage ĝi disaŭdigis muzikon en esperanto.

La aktivaĵo tiris la atenton de amas-komunikiloj kaj rezulte de tio oni radie intervjuis plurfoje la direktoron de *Fundación Esperanto*, Toño del Barrio, televido filmis la ekspozicion kaj diversaj ĵurnaloj interesiĝis pri la afero. HEF celas munti la ekspozicion en aliaj lokoj.

La montritaj libroj apartenas plejparte al Biblioteko Juan Régulo Pérez, sed ankaŭ estas multaj el la kolekto de Esperanto-Liceo de Madrid.

Ana Manero

Ĉina gratulo al UEA

Por memori kaj gratuli la centjariĝon de UEA, ĉinaj gesamideanoj faris kaligrafan rulaĵon. Ĝi estas skribita ĉinligve de kaligrafo Ma Guoliang el provinco Qinghai kaj Esperante de Han Zuwu — prezidanto de Tianjin-a Esperanto-Asocio. La ĉina skribaĵo signifas, ke Esperanto transiris tra la mondo, kaj Ĉinio gratulas UEA okaze de la 100-jara fond-jubileo. Sub la ĉina frazo estas skribita en Esperanto “Esperanta stafeto tra la mondo. Gratulo al UEA-Jubileo el Ĉinio”.

La 9an de marto membroj de Tianjin-a Esperanto-Asocio surskribis kaj stampis la rulaĵon, kaj poste ili transdonis ĝin al Xian Esperanto Asocio. La kaligrafajo pasas tra ĉinaj urboj, en kiuj E-organizoj kaj esperantistoj surskribos kaj stampos ĝin. Fine ĉina esperantisto donacos ĝin al UEA dum la 93a UK en Roterdamo.

La agado estas planita de redakcio de *Tra La Mondo* kun multaj subtenoj de ĉinaj gesamideanoj.

Wei Shan

Esperanto-muzeo: revo realiĝas

Jam 15 jarojn funkcias en la urba muzeo en Česká Třebová (laŭ la subskribita kontrakto pri kunlaboro inter ĝi kaj la Ĉeĥa Esperanto-Asocio) fako *Historio de Esperanto en ĉeĥaj landoj*.

Ĝis nun ĉi tiu fako estis deponejo de esperantaĵoj. Tio estas ankaŭ tre grava por konservi la esperantaĵojn por estontaj generacioj.

Tamen ĈEA revis pri daŭre atingebla Esperanto-ekspozicio. Kaj ĉi tiun revon eblos realigi ĉi-jare. ĈEA uzis oferton de la urbo Svitavy kaj preparas en la kunlaboro kun la urbo muzeon de Esperanto en la Domo de Ottendorf en Svitavy, kiu havos, interalie, ekspozicion daŭre viziteblan de publiko. Dum la preparo de la ekspozicio ĝi kunlaboros kun la urba muzeo en Česká Třebová kaj precipe ĝia fako *Historio de Esperanto en ĉeĥaj landoj*.

La inaŭguro okazos du semajnojn antaŭ la ĈEA-kongreso. Do eblos uzi la relativan proksimecon de Přerov kaj Svitavy kaj survoje al aŭ el la kongreso viziti la novan Muzeon pri Esperanto.

(Laŭ ĈEA-Retkomunikoj)

Ni luktas plu

La 8an de marto okazis kunveno de la Internacia Virina Tago ĉe Suda Kultura Halo de Hirosima kun 500 partoprenantoj. Krom ekspozicio sur muro, aparte ĉiuj ricevis broŝuron de elektitaj mesaĝoj, kies unuan paĝon okupis mesaĝo de s-ino Kim Uson, vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio.

Sume 157 mesaĝoj el 50 landoj venis ĝis lasta momento: Azio (17), Oceanio (6), Nordameriko (9), Sudameriko (7), Afriko (10), Eŭropo (108). Ĉar la alvoko el Hirosima temis pri Okinavo, insulo de usonaj militbazoj, kaj la 9a artikolo de la Japana Konstitucio, kiu devus esti la Konstitucio de la mondo, ni luktis, luktas plu.

Hori Yasuo

19 mar 2008 en Peterburgo forpasis
Meri Solomonovna Abolskaja
(1929–2008)

Instruistino de matematiko, ŝi lernis Esperanton en 1956 kaj baldaŭ ekinstruis ĝin ĉeeste kaj koresponde. Ŝi ofte deklamis en Esperanto, verkis lernolibron (1990) kaj studon *Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo* pri Nikolaj Rytjkov (1999). Ŝi estis unu el la plej fidelaj abonantoj de *La Ondo* (ankaŭ ĉi-jare).

Ni funebras kaj kondolencas...

Pluezek: Intensa programo

La Esperanto-renkontiĝoj de la asocio “Pluezek Esperanto” (Francio) dum 16–23 aŭg proponos trihorajn kursojn matene, turismon posttagmeze, atelierojn de la 17a ĝis la 19a, kaj distraĵojn vespere.

Kursoj

Infanoj: Heike Shusser (Germanio), Nian Peng (Ĉinio)

Adoleskantoj: Claude Jausions (Francio)

Komencantoj (plenkreskuloj): Atilio Rojas (Argentino)

Falsaj komencantoj (minimуме 6 monatoj de lernado): Anne Jausions (Francio)

Dua nivelo: Josée Lafosse (Francio), Barbara Pietrzak (Pollando), Ranga (Barato)

Konversacio: Bill Chapman (Britio), Romano Bolognesi (Italio)

Por logistikaj bonvolemluloj: Sabine Trenner (Germanio)

Atelieroj

Botaniko: Alain Delmotte (Belgio)

Horkantado: Françoise Cornujeols (Francio)

Jogo: Marie Savary (Francio)

Teatro: Josée Lafosse

Komputiko: J.Y. Santerre (Francio), P. Cardonna (Francio)

La bretona lingvo: Franck Bodenes (Francio)

La ĉina lingvo: Nian Peng

Kurso por instruonto: Atilio Rojas

Legu pli: <http://www.babelo.org>

Andre Rigault

Boatado en la Nacia Parko

Junulara Esperanto-klubo *Juneco* (Vilno, Litovio) organizos 22–25 maj la 42an *Boatadon* en Ignalina distrikto en la Nacia Parko de Aŭkštajtio.

Dum kvar tagoj ni ekskursos kaj tra-boatos pli ol 20 lagojn kaj lagetojn, riverojn kaj riveretojn. Eblos viziti muzeojn de Ginučiai, kie okazos akvaj proceduroj sub akvofalo, en insulo de lago Baluošas ni festos naskiĝtagojn de naskiĝintoj en majo, okazos nokta promenado al la monto Ladakalnis, baptado de unuafojaj boatadantoj.

Tuj post la boatado en Vilno okazos Tutmonda kongreso de esperantistoj-jurnalistoj.

Olga: ☎ 8-5 23-31-498 ✉ stov@rambler.ru

Jolanta: ☎ 8-5 24-14-997 ✉ jolanjo@gmail.com

Olga Strojewa

Lernu! malvirtualiĝos aŭguste

www.lernu.net — la plej granda lingvo-portalo por instrui Esperanton (nuntempe enhavanta jam 33 lingvajn versiojn) — transiras al nova periodo.

Decembre 2007 la projekto kvin-jariĝis, kaj nun la kerna teamo de *lernu!* pretigas la unuan renkontiĝon de uzantoj, helpantoj kaj kreantoj de *lernu.net*.



Pasintjare debutinta SES (Slava Esperanto-Studado) transformiĝas al Somera Esperanto-Studado, kiu okazos 9–17 aŭg en Modra-Harmónia (Slovakio), kaj kadre de kiu estos aranĝita ankaŭ unua grandskala renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj, helpantoj kaj kreantoj!

La ideo de SES estas fari komunan someran aranĝon, kiu kombinas studadon de Esperanto kun agrabla ferio kaj amuziĝo en internacia etoso kaj kiu estus taŭga kaj por veraj komencantoj, kaj por progresintoj, kiuj volas plibonigi sian lingvokonon. La teamo de *lernu!* jam delonge revas inviti uzantojn kaj helpantojn de la paĝaro al iu komuna aranĝo — nun venis la tempo realigi tiun malnovan revon!

Krom studi Esperanton en divers-nivelaj kursoj, gvidataj de famaj Esperanto-instruistoj (ĝis nun konfirmitaj Stano Marček, Birke Dockhorn, Bertilo Wennergren), eblos partopreni buntan posttagmezan programon, koncertumi kaj danci vespere, la tutan tempon praktike utiligi siajn lingvosociojn komunikante kun aliaj partoprenantoj el diversaj landoj, renkonti prizorgantojn de *lernu!*, lerni pli pri ĝi kaj influi estontan evoluon de la paĝaro, ekskursi, naturumi kaj turismumi (SES okazos en belega loko apud arbaroj kaj lagoj), sportumi kaj multon pli.

Legu pli: http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontiĝoj/SES/index.php

Peter Baláz

“La Ondo” partoprenos

26–30 maj. Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jurnalistoj en Vilno (Litovio).

26 jun – 2 jul. FREŜO en Olsztyn (Pollando).

Ĉe Adriatiko literaturi

La ĉi-jara OSIEK-konferenco okazos 12–18 jul 2008 en Slovenio, en historia urbeto Šempeter. Ĝi situas apud Gorizia (Italio) kaj Nova Gorica (Slovenio), 15 km de Adriatika maro.

Al la bunta kultura programo kun la ĉeftemo “Fernando de Diego — vivo kaj verkaro” kontribuos, interalie, Abel Montagut, Antonio Valén, Eugène de Zilah, Josef Dörr, Josip Pleadin kaj profesia aktoro Saša Pilipović.

La membroj de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto Konferencoj) havos sian ĝeneralan asembleon kaj voĉdonos por OSIEK-premio.

Kursoj de Esperanto, “slovena eksprese” kaj infanludejo helpas partoprenon de komencantoj kaj familioj.

Tre favoraj kondiĉoj kaj prezoj de loĝado en nova studenta hejmo kaj ĝia strategia situo ebligas multajn dumkonferencajn ekskursojn, facile realigeblajn (organizite aŭ memstare) en alloga regiono inter Ljubljana kaj Venecio.

Postkonferencoj eblas elekti inter aldona tritaga turisma aranĝo en Slovenio aŭ vojaĝo al la 93a UK en Roterdamo kun internacia aŭtobusa karavano de Orbis Pictus, loka kaj teknika organizanto de IEK.

✉ Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio

☎/fax +39/040 767 875

✉ orbispictus@iol.it

<http://www.osiek.org>

Višnja Branković

Tria Festivalo en Zaozhuang

Tria Internacia Festivalo de Esperanto — kunaranĝota de Zaozhuang-a Esperanto-Asocio (Ĉinio) kaj Seula Esperanto-Kulturcentro (Koreio) — okazos 27–29 jun en Zaozhuang (Shandong-provinco, Ĉinio).

En la festivalo ni aranĝos prelegojn pri Esperanto kaj kulturo, vizitojn de Zamenhof-statuo, urbo-domo kaj fabrikoj, ekspozicion de la dua internacia foto-konkurso (reta), aŭkcion, ekspoziciojn pri ĉinaj artaĵoj kaj poŝtaĵoj, turismon en Granda Kanalo kaj Granata Ĝardeno (la plej granda en la mondo), bankedojn en ĉinaj familioj, praktikon de uŝuo kaj tradicia medicino.

Se aliĝos pli ol dek esperantistoj el iu lando, ni aranĝos Tagon de tiu lando.

✉ Wenhua Xi Lu 23 Hao (1-F de TuShu Guan, Zaozhuang, Shandong CN-277100, Ĉinio

✉ semio@163.com

Unufraze

★ 17 feb tutlanda germana TV-kanalo ARD (kanalo 1) prezentis pozitive Eon, ĝian skizan historion k nuntempan vivantan karakteron en kvinminuta programo, kiu enhavas scenetojn de E-kurso far Zsófia Kóródy en München. (ICH)

★ 21–23 feb okaze de la patrinlingva tago k Lingva Jaro en la Popoluniversitato de Maribor (Slovenio) funkciis ekspozicio pri Eo. (*Eŭropa Bulteno*)

★ E-stando estis inter la 200 lingvostandoj en *Expolangues*, kiu okazis 6–9 feb en Parizo. (*Heroldo de Esperanto*)

★ Interkultura Centro Herzberg ricevis en la malnova urbodomo subtegmentan kromĉambron por la estonta urba E-arkivo. (ICH)

★ Ĉiumonate la duan dimanĉon en la urbocentra preĝejo de S-ta Marko en Krakovo p. Stanisław Plachta celebras Sanktan Meson en Eo (Maria Majerczak)

★ Je 22 mar al la 93a UK en Roterdamo aliĝis 1395 personoj el 62 landoj; plej multe el Francio 184, Germanio 145, Nederlando 136, Belgio 66 k Italio 60. (www.uea.org)

★ Kultura Kooperativo E-ista (Brazilo) ekspedis la 62an libropakajon de la kampanjo “Esperanto en la Bibliotekojn” al la Brazila Beletro Akademio en Rio-de-Janeiro. (Aloísio Sartorato)


★ Ekde 1 apr urugvaja E-retradio *Radio Aktiva* ĉesigos siajn ĉiutagajn elsendojn k daŭrigos elsendi nur podkaste unu fojon ĉiumonate. (Daniel Bebelacqua)

★ 23 feb 2008 en la ŝtata mezlernejo de Ayahohoue, Asocio de Beninaj E-istoj okazigis feston de la Semajno de Internacia Amikeco, kiun krom e-istoj partoprenis invititoj k lernantoj; 17 plej bonaj gelernantoj estis premiitaj per lernolibroj, kajeroj, skribiloj k aliaj lerniloj. (Landa Agado).

★ Post 28-jara redaktado Veli Hämäläinen forlasis la redaktorecon de *Vekilo* en Tampere. (*Vekilo*)

★ Kataluna E-Asocio eldonos en 2008 kelkajn katalun-lingvajn broŝurojn pri lingvaj temoj, i.a. de André Martinet, Umberto Eco, Claude Hagège k Robert Philipson. (*Kataluna Esperantisto*)

★ En 2007 SAT-Amikaro havis 716 membrojn, kompare kun 705 en 2005 k 723 en 2006; krom francoj kotizis 19 membroj el Belgio k 6 el Svislando. (*La Sago*)



FREŜO: Olsztyn atendas vin

Olsztinaj esperantistoj invitas al Olŝtino, la ĉefurbo de la regiono Varmio kaj Mazurio, por FREŜO (Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinton), kiu okazos 26 jun – 2 jul 2008.

La programo estos plejparte amuza kaj turisma, sed ne mankos ankaŭ prelegoj, inter kiuj ni menci la rakonton de Halina Gorecka pri la historio kaj nuntempo de Kaliningrado — la ĝemelurbo de Olŝtino. Krom tio okazos ekskurso laŭ Kopernik-itinero, vizito de apud-olŝtina arboĝardeno, ripozo ĉe ĉirkaŭaj lagoj, artaj programeroj, brulŝtiparo kun biero kaj kolbasetoj, kaj, antaŭ ĉio, Esperanto-kvizoj kun valoraj monpremioj, kiujn gvidos Marian Zdankowski.

La FREŜ-ejo troviĝos en la Internulejo de Postlicea Lernejo preskaŭ en la urbocentro. Ĝi estis konstruita en 1911–1913 kiel domo por protekto de malsanuloj kaj maljunuloj. Post la dua mondmilito en la konstruaĵo lokiĝis Alta Porpastra Seminario, kiu funkciis ĉi tie ĝis 1962. Poste la domo estis transdonita al medicina mezlernejo. Nuntempe ĝi servas kiel internulejo por gelernantoj de la Postlicea Lernejo kaj ankaŭ por studentoj de la Olŝtina Universitato.

La direktorino de Postlicea Lernejo tre favoras la aranĝon, kaj tio estas ankaŭ videbla en proponitaj prezoj — nur ĉ. 10 eŭroj tage por tranoktado kaj tuttaga manĝado. Aliĝkotizo estas 15 eŭroj ĝis 31 maj 2008, 20 eŭroj poste kaj surloke.

Detalajn informojn petu de Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska poŝte (PL 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m. 5, Pollando) aŭ rete (efrenszkowska@wp.pl)

Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska

Japanio suverena en la membrostatistiko de UEA por 2007

La Jokohama UK faris el Japanio superpotencon en la membrostatistiko de UEA en 2007. La nombro de individuaj membroj (IM) en la pasintjara kongreslando pli ol duobligis: el 410 en 2006 al 858. Kun 991 aligitaj membroj (AM) Japanio liveris entute 1849 membrojn de UEA kaj gajnis la unuan lokon ankaŭ en la suma statistiko de ambaŭ specoj de membreco.

Estis entute 6011 IMoj; en 2006 ili estis 6066. Perdis precipe la landoj, kie la Florenca UK akcelis membriĝojn en 2006, i.a. Francio (-121), Italio (-84), Hispanio (-43) kaj Svislando (-30). Tamen, la ĝenerala malkresko ne okazis pro UK sed pro tio, ke IJK estis malpli granda ol en 2006. La malplimultiĝo de junaj membroj estis pli granda ol la ĝenerala malkresko. La nombro de junaj individuaj membroj de UEA — samtempe individuaj membroj de TEJO — estis 394 (-121). En 2008 TEJO tamen denove antaŭvidas pli grandan IJK kaj sekve ankaŭ rekreskon de siaj individuaj membroj.

Apud Japanio, almenaŭ 100 IMojn liveris Francio (548), Germanio (514), Brazilo (344), Usono (330), Nederlando (249), Italio (204), Svedio (164), Finnlando (156), Ruslando (151), Britio (149), Belgio (148), Hispanio (143), Ĉinio (141), Hungario kaj Pollando (po 100).

La nombro de AMoj estis 11477 (-255). Temas pri tiuj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Kun 1051 AMoj la landa asocio de Ĉinio sola superis la limon de 1000. Sekvis la asocioj en Japanio (991), Germanio (763), Italio (737), Belgio (513), Pollando (500), Britio (391), Usono (385), Francio (332) kaj Svedio (326).

La tuta membraro de UEA, t.e. individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis 17488. En 2006 ĝi estis 17798; sekve okazis malkresko de 310. Daŭras do la falanta tendenco. Dek jarojn pli frue, en 1997, UEA havis 20131 membrojn, kiuj konsistis el 7113 individuaj kaj 13018 aligitaj membroj. Ekde 1999 la suma nombro insiste restas sub 20000.

Ĉefe pro la malkresko de IMoj, falis ankaŭ la nombroj de pagitaj abonoj al la revuoj de UEA kaj TEJO. La oficiala organo de UEA, *Esperanto*, nombris 4017 pagitajn abonojn (-72), kaj la sociokultura revuo de TEJO, *Kontakto*, 745 abonojn (-148).

GK UEA

Persona lingvo

de Dafydd ab Iago el Bruselo

Post monatoj da cerbumado la Eŭropa Komisiono (EK) klarigis la ideojn, kiuj gvidos la politikon pri multlingvismo, kiu estos publikigota en septembro 2008. Nun en EK cirkulas la dokumento “Proponoj de la Grupo de intelektuloj por interkultura dialogo”.

La eŭropa respondecilo pri multlingvismo, komisionano Leonard Orban, konsideras la elekton de lerninda(j) lingvo(j) kiel personan aferon. Laŭ Orban, EK ne povas doni “internacian statuson” al iu lingvo, ĉar en la Eŭropa Unio (EU) nur membroŝtatoj havas la plenan kompetenton organizi siajn edukad-sistemojn. Tamen en 2002 la membroŝtatoj interkonsentis, ke ĉiu EU-civitano eklernu du lingvojn. Nun la Grupo por interkultura dialogo proponis, unue, **lingvon de komunikado** laŭ la nivelo de “internacieco” kaj, due, **lingvon persone adoptitan**.

La Grupo por interkultura dialogo estis fondita de EK en 2006 por esplori, kiel multlingvismo povas kontribui al la Eŭropa integriĝo. La grupon gvidas Amin Maalouf, libana aŭtoro kaj franca ŝtatanano.

La raporto de la Maalouf-a grupo proponas al la Komisiono fari pli por promocii lingvo-lernadon ekster lernejoj kaj universitatoj. Lingvolernado devas fariĝi parto de libertempa agado, kiel, ekzemple, sporto. Tamen post la publikigo de la raporto EU-funkciuloj ne perdis tempon por klarigi, ke edukado estas en la kompetento de la ŝtatoj, kaj la Komisiono povas nur cirkuligi “gvidliniojn” pri “plejbona praktiko”. La raporto de la Maalouf-a grupo ankaŭ petas, ke EK okazigu alt-nivelan konferencon pri la problemo de tradukado kaj interpretado je EU-nivelo.

Diversaj reagoj venis.

Ekzemple, Klaus-Peter Willsch (CDU), membro de la germana parlamento Bundestag, volas plifortigi la pozicion de la germana. “90 milionoj el 493 milionoj de EU-civitanoj parolas la germanan kiel la gepatran lingvon, — diris Willsch. — Ne devas esti, ke oficialaj retejoj de la Eŭropa Unio estas nur en la angla kaj franca, kaj ne en la germana”. Willsch kritikis la Komisionon: “La Komisiono havas centran decidan kaj kunordigan rolon en la instanckomplekso de la Eŭropa Unio. La civitanoj en Germanio, la plej granda paganto al la EU-buĝeto, devas havi la eblecon esti informataj en sia gepatra lingvo pri la taskoj kaj agadoj de ĉi tiu grava politika instanco”. Laŭ Willsch, ĝis kiam ĉiuj lingvoj estos egale traktataj en la EU, almenaŭ la germana devas havi la samajn privilegiojn kiel la franca kaj angla.

Reagis ankaŭ esperantistoj. Laŭ nederlanda lingvisto Marc van Oostendorp, la koncepto de “persone adoptita lingvo” estas nerealigebla. Van Oostendorp preferus la tiel nomatan “skandinavan” modelon, kie foje oni strebas kompreni la aliajn lingvojn (almenaŭ la norvegan, svedan kaj danan).

Tamen Henri Masson estas skeptika pri la skandinava vojo. “Persone, kvankam ne lingvisto, kaj eble pro tio pli prave, mi estas tre dubema. La skandinaviaj lingvoj aspektas al mi ‘fizionomie’ pli proksimaj inter si (escepte de la islanda) ol, ekzemple, la itala, la franca, la hispana, la rumana. Por mi, tio estas nur ludeto por sinpretendanta ‘elito’; tio aspektas al mi kiel farso, precipe se oni celas precizecon kaj fidindecon. Tio ĉiam kondukos al la angla kiel referenca lingvo, kiel savlingvo”, — avertas Masson.



Libana-franca verkisto Amin Maalouf (Foto de la Aŭdvida departemento de la EK)

“La termino ‘skandinava modelo’ ne estas nekonata en la sociolingvistiko. Temas ne pri la fakto, ke skandinavo komprenas unu la alian, sed ke oni ne alstrebas unuecon de lingvo ene de konversacio. Krome, ne temas pri nura formala ‘fakto pri lingva simileco’ — interkompreniĝo ĉiam ankaŭ dependas de la volo de la partneroj kompreni unu la alian, kaj do pri sociopolitika realo”, — opinias van Oostendorp.

Laŭ la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain, estas facile kritiki la raporton de Maalouf. “Sed plej celtaŭge por ni estas pripensi, kiel utiligi la raporton por niaj celoj. Ekzemple, ni povus substreki, ke pluraj Esperantistoj — homoj kiuj intense kaj longdaŭre uzadas ĝin — majstras Esperanton kvazaŭ kiel duan gepatran lingvon”, — diris Ó Riain.

Loka etoso aŭ klasika tradicio?

Malfeliĉe, *La Ondo* de decembro atingis min tro malfrua por limdata respondo al sondopinio. Sed mi volas certigi vin kaj la stabon, ke la gazeto ĉiel plaĉas al mi, kiel fidele leganto kaj subtenanto de la idealoj esprimitaj en ĝiaj paĝoj.

Kutime mi rezistas opinisondadon, kvankam mi agnoskas, ke ĝi estas grava gvidilo por eldonisto precipe por tiu gazeto kies kultura celo estas direktita al speciala lingva kadro kiel Esperanto.

Ĉu *La Ondo* estas tro partianeca aŭ tro sendependa? Ne. Sed vere, ĝi havas la saman malfortan inklinon, kiel aliaj eldonaĵoj en la esperanta mondo. Loka etoso ofte mankas, kaj emfazo sur klasika tradicio ĉiam okupas centran atenton. Ŝajnas al mi, ekzemple, taglibro de ordinara soldato de usona milito inter la ŝtatoj (1860–1865) havas egalan intereson al la internacia komunumo kiel la fama Gettesburg Prelego de Abraham Lincoln. Mi preferas legi ne la plej famajn verkojn en Esperanto, kiuj jam estis tradukitaj en mian nacian lingvon, sed mi estas tre scivola pri tagaj aferoj kaj sperto kiu mankas al la komunumo en mia patrolando.

Mia reago al Esperanta redaktoro, kiu serĉas opinion de leganto, ne samas al mia reago al politikaj opinisondoj. Ĝenerale, mi ne fidus ian ajn publikan demandadon, kaj kredas, ke tia metodo validas nur por merkata reserĉado. Mi ne anticipas, ke *La Ondo* devas speguli miajn ŝatojn kaj malŝatojn. Sufiĉas, ke mi daŭre ricevas tiun bone redaktitan gazeton.

La letero de la indiana tribestro Seatlo estas aldonita al mia letero kiel nur unu ekzemplo de malaperanta kulturo. Esperanta gazetaro, vere, estas nia ilo konservi la Esperantan centjaran tradicion en la internacia komunumo.

Elson B. Snow (Usono)

UEA fariĝas 32-jara — gratulon!

“UEA cent”, — oni legas malgrandliteraĵon sur la emblemo de la roterdama kongreso. Ŝajne iuj ne volas multe okupiĝi pri historio, kiam la Asocio atingas centjarecon. Sed eventuale ili pravos — ĝi fariĝas iusence nur 32-jara.

La esperantistoj jam antaŭ 1908 diskutis pri internacia ligo, plej frue eble en 1890. UEA havis sian akuŝfazon ekde 1907, kiam Théophile Rousseau, Hector Hodler kaj iliaj kunbatalantoj kunsidis dum la Universala Kongreso de Kemбриĝo, diskutante pri “konsuloj” (kio poste fariĝis la “delegitoj”). En decembro 1907 Hodler publikigis broŝuron pri konsuloj kaj “Esperanto-oficejoj”, kaj en februaro 1908 sekvis cirkulero: Oni bezonas internacian organizaĵon por antaŭenigi Esperanton per praktikaj servoj. Plia cirkulero proponis statuton por tia organizaĵo, kun la limdato por reagoj la 28a de aprilo 1908. Tiun daton oni poste konsideris la fondiĝo-dato de UEA.

Reinventoj 1920 kaj 1934

La Asocio de 1908 estis tre malsama ol tiu de 2008, kaj eblas eĉ diri, ke ĝi estis jam tre malsama de la Asocio de 1920, kiam la Asocio ricevis la kvaran statuton — aŭ la kvinan, se oni konsideras ankaŭ la proponon de 1914 ne realigotan pro la milito. Oni povas nomi la jarojn ĝis 1920 iusence la “eksperimentajn jarojn” de UEA. Per la reformo de 1920 la Asocio pli aspektis kiel “normala” asocio, kun Komitato kaj Estraro (nomata “Komisiono”), anstataŭ sola Komitato.

Dek kvar jarojn poste, en 1934, sekvis la kvina (aŭ sesa) statuto. Ĝi reprezentas eble la plej radikalman rompon en la historio de la UEA-strukturo. La naciaj societoj en 1932 provis fondi konkurencajn asociojn, en kiu la membroj estos la membroj de la naciaj societoj. UEA, bazita sur la principo de individua membreco, minacis per defendo-milito. Danke al la cedo de UEA estiĝis “Nova UEA”, kiel tegmento kaj de naciaj societoj (nun: Landaj Asocioj) kaj de individuaj membroj.

Civila milito 1936-1947

Pro la intrigoj de antaŭaj UEA-gvidantoj, la Estraro de Louis Bastien devis rezigni pri la “Nova UEA” kaj anstataŭe fondis novan asocion: Internacia Esperanto-Ligo, kun fonda alvoko de la 18a de septembro 1936. UEA iam nomis sin “Utila, Efika, Agema”, sed tio multe pli estis vera por IEL, nun preskaŭ forgesita. La “ĝeneva” UEA pluvegetis. Se en 1947 okazis unuiĝo de IEL kaj UEA, tiam ne pro ia pacemo post la terura dua mondmilito, sed pro la fiasko de UEA.

La nova UEA ĉi-foje nomiĝis “kunfandita” UEA, kaj ankoraŭ en la nuna statuto oni legas, ke ĝi estas kunfandiĝo de UEA el 1908 kaj IEL el 1936. En tiu tempo, do 1947, ĝi estis fakte ne registrita asocio, ĉar tio ne estis la kutimo en Britio. Juran personecon UEA ricevis nur en 1958, tri jarojn post la translokiĝo al Nederlando.



Nederlanda asocio

En tiu epoko (antaŭ la jaro 1976), en Nederlando la asocioj bezonis leĝan agnoskon, se ili ekzistu eterne. Kutime asocio fondiĝis tial por 29 jaroj, ĉar tiam sufiĉis agnosko fare de la ministerio pri internaj aferoj. En la kazo de UEA, oni prenis la kunfandiĝon de 1947 por ekkalkuli la 29 jarojn. Tio signifis ke UEA en 1976 devis “refondiĝi” (ŝanĝi la koncernajn datojn en la statuto), por teni sian juran personecon. (Temas cetere hazarde pri la sama jaro 1976, en kiu Nederlando reformis la regulojn: ekde tiam sufiĉas agnosko de notario por havi “eternan” asocion.) Do en 1976 la statuto estis ŝanĝita, tial ankoraŭ en la nuna statuto oni vidas la jaron 2005, kiel finon de periodo. Tamen la lasta frazo en la koncerna paragrafo diras: “UEA, ekde validiĝo de ĉi tiu Statuto [de 1980, ZvD], estas fondita por nelimigita tempodaŭro.”

Do, kiam UEA estis fondita? Ĉu en 1907, 1920, 1934, 1936, 1947, 1958, 1976? Eble dum la roterdama kongreso troviĝos momenteto por cerbumi.

Ziko van Dijk (Nederlando)

Ora Cervo aĉetebla

Hotelo *Goldener Hirsch* (Ora Cervo) en la Esperanto-urbo Herzberg ankoraŭ favorpreze haveblas. Dum kelkaj lastaj jaroj multaj Esperanto-gastoj tranoktis tie. Pro la malsaneco de la ĝisnuna mastro, estas unika bonŝanco akiri la hotelon vere favorpreze.

Laŭ niaj informoj la hotelo:

- 1) Disponas pri tereno de pli ol 2.700 m² kun ĝardendometo. La tereno jam pli valoras ol la tuta hotelobjekto.
- 2) Estis konstruita en 1955.
- 3) Disponas entute pri 12 hotelĉambroj kun entute 20 litoj.
- 4) Ĉ. duono de la hotelĉambroj estas en akceptebla ĝis bona stato. La aliajn ĉambrojn oni devos tute renovigi.
- 5) La restoracio en solida stato disponas pri 50–70 lokoj. Krome ekzistas moderne ekipita seminariejo por 20–30 personoj.
- 6) En la subtegmentejo troviĝas du malmodernaj loĝejoj (ĉ. 40 m² kaj 50 m²). Tie oni povas konstrui amasloĝejon aŭ grandan loĝejon por la posedanto.
- 7) Grandparte ekzistas modernaj fenestroj. La domo havas gashejtadon. Izolaĵoj, ekz-e, sub la tegmento, evidente mankas. La eksterajn domflankojn oni devos renovigi aŭ almenaŭ blankfarbi.
- 8) La kelo estas granda kaj seka.
- 9) Ekzistas grandaj modernaj necesejoj por viroj kaj por virinoj.
- 10) Krome ekzistas du bonaj betongaraĝoj kaj bierĝardeno.

Principe la hotelo estas tuj uzebla kun malmoderna tamen funkcia kuirujo. Ekzistas la ebleco ricevi por renoviglaboroj kaj izolado 30%-an subvencion. Krome la subdistrikto pagos (post peto) subvencion inter 5% ĝis 20% por la aĉetprezo, se oni uzos la domon kiel hotelon (por turistoj, kursoj, festoj), ktp.

Kiu kuraĝa kaj kompetenta esperantisto povos mastrumi la hotelon (ankaŭ por Esperanto-turismo, konferencejo)? Laŭdire la hotelo kostas nur ĉ. 85 mil eŭrojn.

Pluaj informoj estas ĉe ni (esperanto-zentrum@web.de) aŭ ĉe “Burghardt Consulting, Gerald E. Burghardt als Insolvenzverwalter” (☎ 05528-999688).

Peter Zilvar (Germanio)

Sur la maldekstra foto estas *Goldener Hirsch*, fotita de helikoptero. Ĉu iu investema samideano faros ĝin *Ora Cervo*?

Bjalistoko invitas volontulon

En la Societo pri la Internacia kaj Interkultura Interŝanĝo ANAWOJ la Bjalistoka Esperanto-Societo anoncis pretecon akcepti por unu jaro volontulon el eŭropunia lando kadre de la Eŭropa Volontulado, programo *Junularo en la Aktivado*.

Volontulo kune kun la membroj de la Societo laboros pri la popularigado de Esperanto-ideo: respektado de la kultura varieco en la kunligo kun la kontraŭbatalado de rasismo kaj ksenofobio. BES atentigis en sia anoncodeklaro, ke la kono de Esperanto grandigus la ŝancojn de volontulo por efika agado.

☎/fakso 48 85 717 91 45

✉ anawoj@anawoj.org

<http://www.espero.bialystok.pl>

Ela Karczewska (Pollando)

Nova pola registaro favora por Esperanto

Nun en Pollando estas la nova registaro, kiu estas pli favora por Esperanto ol tiu, kiu finis la regadon. 21 jan marŝalo de la Pola Senato Boruseviĉ akceptis gesamideanojn el la klubo *Kastelo* el Malbork. Li akceptis honoran patronecon de la 60a fervojista kongreso en Poznano.

Mi esperas, ke jam pasis la tempo, pri kiu skribis s-ano Zbigniew Galor kaj aliaj gesamideanoj. Estas plu homoj, al kiuj Esperanto ne plaĉas aŭ laŭ ili estas juda lingvo, kiun oni ne devas lerni, instrui ktp. Ja antisemitoj plu vivas kaj agas. Laste eĉ ili renkontiĝis en la preĝejo de jezuitoj en Krakovo, kie oni parolis diversajn opiniojn malbonajn pri judoj ktp. Estis tie ankaŭ *Radio Maryja* kaj televido, en kiuj elpaŝas kaj prezentas prelegojn, opiniojn konataj antisemitoj kaj ultranacionalistoj. Bedaŭrinde, ofte en tiu ĉi radio parolis la ministroj kaj eĉ ĉefministro de la registaro, kiu fine foriris. Ankaŭ nun ili estas tie akceptataj kaj apogas tiun ĉi radion.

Inter esperantistoj estas personoj, kiuj apogas similajn amaskomunikilojn. Bedaŭrinde. Mi eĉ miras, ke ili estas esperantistoj kaj batalas kontraŭ sin mem, ĉar dank' al Zamenhof, judo, ili konas Esperanton.

Jerzy Marian (Pollando)

Leterkesto

Mi reabonis por 2008. Tamen, mankas raportoj pri Zamenhof-festoj, ekzemple, en Sydney kaj Antverpeno. Kial "Komitatano Z", kaj ne la vera(j) nomo(j)? Gratulojn por via paĝo 17 (LO 2/2008) pri libroj en 2007.

Lucien Giloteaux (Francio)

Almetante kopion de la poŝtkarto, eldonita por nia Filio (originalaj delonge elĉerpiĝis), mi volas rememorigi al vi preskaŭ forgesitan formon de E-aktivado. Antaŭ pli ol 30 jaroj Erik Carlen "elpensis" promocii la lastan plenan semajnon de februaro, kiel tempon de pli intensaj internaciaj kontaktoj. Precipe esperantistaj. Poste oni elpensis novajn rimedojn propagandi Esperanton, kiel Ago-Tago, Ago-Semajno ks., kiuj dampis la belan atingajon de Carlen. Estus, tamen, pli prudente kontinui la malnovajn ol enkonduki novajn.

Marian Łaba (Pollando)

Esperantisto arestita pro seks-atenco — la februara *Ondo* (pĝ. 13) reproduktas informojn el *Lfolio* sub jena malfajna titolo. La titolo estas vortumita en bedaŭrinda maniero. La titolo en *Lfolio* estis *Belga esperantisto akuzata pri seksatenco kontraŭ infano*; kompare, en *La Ondo* mankas la elemento pri akuzo, suspekto. Ŝajnas nuanco, sed estas ja gravege ĉu iu estas arestita pro faro aŭ pro suspekto pri faro.

István Ertl (Luksemburgio)

Sporto per Esperanto

La 26an de marto la prezidanto de Monda Esperanta Ligo por Sporto (MELS) Klarita Velikova vojaĝos al Burundo por instrui la korean tradician luktoarton Tekkjonon al la nova sporta filio de MELS tie. Tuj post lingva seminario okazos intensa ĉiutaga trejnado de junaj sportemaj esperantistoj, kiuj volus ekpraktiki la korean kulturajn uzante Esperanton.

Tekkjono estas la sola luktoarto rekonita kiel Grava Nemateria Kultura Heredaĵo (№76) de Koreio. Ĝi ankoraŭ neniam estis demonstrita en Afriko.

La trejnado okazos en Rumonge, kaj ĝi estos parto de la sporta projekto en Burundo, kiu komenciĝis per popularigo de Esperanto fare de la entuziasma Esperanta futbalteamo *Esperanto FC*. Membroj de MELS bonkore subtenis la teamon, aĉetante pilkojn, vestojn, ŝuojn kaj aliajn necesajn. Per ilia agado multaj homoj tie eksciis kaj eklernis Esperanton.

La unua fazo de la projekto (vojaĝo, restado, trejnejo kaj teknikaj&edukaj rimedoj) estos realigita dum la seminario en Burundo per la persona financa investo de la prezidanto de MELS, Klarita Velikova.

Jürgen Kloker
sekretario de MELS



Klarita Velikova montras Tekkjonon

Nombroj sen komentoj

Moskvo inter la plej malpuraj urboj

Kompanio *Mercer Human Resource Consulting* kompilis liston de la plej (mal)puraj urboj. Ĝi esploris la staton de la aero kaj trinkakvo, utiligadon de la ruboj, sanservon kaj infektajn malsanojn en 215 grandurboj.

La plej malpura urbo estas Bakuo, la ĉefurbo de Azerbajĝano kun 27,6 poentoj; sekvas la bangladeŝa Dako (29,6) kaj Antananarivo en Madagaskaro (30,1).

Moskvo okupas la 14an lokon kun 43,4 poentoj. Laŭ ĉi tiu listo ĝi estas la plej malpura grandurbo en Eŭropo. La plej pura en la mondo estas Calgary en Kanado kun 131,7 poentoj.

... kaj inter la plej riĉuloj

6 mar la revuo *Forbes* publikigis la ĉiujaran liston de la plej riĉaj personoj en la mondo, kiuj havas almenaŭ unu miliardon da usonaj dolaroj. Unuafoje, en la laŭurba listo la unuan lokon okupas Moskvo kun 74 miliarduloj. La duan lokon okupis Nov-Jorko (71 miliardulo); sekvas Londono (36), Istanbulo (34) kaj Hongkongo (30).

En Ruslando nun estas 87 dolaraj miliarduloj, inter kiuj plej riĉas Oleg Deripaska, kies posedaĵo — 28 miliardoj da dolaroj — estas la naŭa plej granda en la mondo.

En la listo de la riĉuloj Ruslando unuafoje superis Germanion kaj okupas la duan lokon. La unua estas Usono.

Usono — prizono

Usono plej supras ankaŭ en la listo de enprizonigitoj. Laŭ neregistara esplorkompanio *Pew Center*, Usono estas la plej prizonoza lando en la mondo. Komence de 2008 en la usonaj prizonoj estis pli ol 2,3 milionoj da homoj.

En Ĉinio, kies loĝantaro kelkoble pli grandas ol tiu de Usono, estas 1,5 milionoj da malliberigitoj, kaj en la 145-miliona Ruslando post la krado "sidas" 890 mil personoj.



Parencaj lingvoj

Eseo de Bujdosó Iván

Komparado de lingvoj

Komputiloj, programoj kaj datumoj fariĝis parto de nia ĉiutaga vivo. La ŝanĝiĝo estas tiel rapida, ke iuj aplikoj naskiĝas ne pere de oficialaj projektoj, sed spontanee. Ankaŭ la ideo de la nuna temo naskiĝis tiel.

En AIS-sesio (30 aŭg 2004, Komarno) mi aŭskultis la prelegon de Helmar Frank pri lingvo-kibernetiko, kie temis pri la “temperaturo” de iu teksto. Li direktis min al la studoj de Zipf kaj Mandelbrot.

La Zipfa leĝo studas tiujn fenomenojn kies distribuo ne estas laŭ la normala statistika distribuo, sed estas kelkaj tre oftaj kaj multe da tre maloftaj eventoj. Ekzemple, la distribuo de la havaĵoj estas laŭ tiu, kiun montris la itala sciencisto Pareto: 20 procentoj de la loĝantoj posedas 80 procentojn de ĉiuj havaĵoj. La merito de Zipf estis, ke li ordigis la distribuon laŭ *ofteca rango* kaj ĉefe tio, ke li desegnis tion kun *logaritmaj aksoj*. Tiam la distribua kurbo fariĝas linia. Oni povas determini la klinon rilate al la akso de tiu ĉi linio.

Esperanto kaj la leĝo Zipf

Iam mi scivolis, ĉu esperantisto scias pri tio kaj mi enskribis la vortojn “Esperanto” kaj “Zipf”. Je mia surprizo mi ekvidis tie seminarian taskon de iu usona universitato. La studentoj, kiuj studas tie komputadon, ricevis la taskon esplori, ĉu Esperanto ekstericas laŭ la vortstatistikaj karakterizaĵoj. Estas nekutima afero, ke neesperantistoj interesiĝas pli pri kelkaj aspektoj de Esperanto ol esperantistoj. Sed ili eksentas la ŝancon por io science interesa. La lekcisto, kiu donis la taskon, “enamigiĝis” al la temo. El la seminaria tasko fariĝis serioza esploro eĉ kun la apliko de la plej evoluinta teorio: artefarita neŭra reto. Ili ekzamenis ses lingvojn: la anglan, Esperanton, la francan, la germanan, la hispanan kaj la italan. Ĉe ĉiuj

lingvoj estis grandega korpuso, ĉe la angla 97 libroj, ĉe Esperanto 34 libroj, entute 283 libroj.

La rezulton de la esploro oni konigis en la internacia scienca konferenco de IASTED “Artefarita Inteligenteco kaj ĝia Apliko” (Manaris et al. 2006). Ĉefa konstato: *Esperanto estas “artefarita”, sed laŭ la statistikaj datumoj oni ne povas diferencigi naturan kaj artefaritan lingvojn.*

La esploro baziĝis sur la Zipf-leĝo. Oni determinis ĉe ĉiuj lingvoj la kvanton da vortoj, vortduoj, vorttrioj, vortdistancoj [kiom da aliaj vortoj estas inter du aperoj de la sama vorto] kaj la vortlongejoj. La statistikaj proprecoj de Esperanto estis similaj al la proprecoj de la aliaj kvin lingvoj. Per la apliko de neŭraj retoj oni instruis la analizan sistemon je tio, ke ĝi aŭtomate rekonu la lingvon de iu teksto. La divenado sukcesis plej bone, se oni aplikis la korelacian koeficienton kaj la klinon de la Zipf-linio de la vortdistanco.

Elektado de la esplorota teksto

La supra esploro ekzamenis nur ses lingvojn. Mi rimarkis, ke la vico laŭ la Zipfa klino estas: Esperanto, hispana, germana, itala, franca kaj angla. Esperanto do ne estas meze de la ekzamenitaj ĉefaj eŭropaj lingvoj, ĉu ĝi tamen ekstericas?

Mi decidis ekzameni la aferon sur pli ampleksa tereno. Mi trovis tre interesan 21-lingvan materialon sur interreto, la tekstojn de la konstitucipropono de la Eŭropa Unio. Kvankam tiu ĉi materialo ampleksas nur po 35 paĝojn, tamen ĝi havas kelkajn favorajn proprecojn. La tradukadon — certe — oni faris tre zorgeme, ĉar ĝi estas la oficiala dokumento de Eŭropa Unio. Same la esperantlingvan tradukadon faris zorgeme plurlingva internacia grupo. Kaj oni devas sincere danki al la geedzoj Ludoviko Molnár kaj Julianna Farkas, kiuj multon faris por la tradukado kaj al István Mészáros, kiu laboris multe, por ke la materialo estu libere alirebla en interreto.

Sed ĝia plej grava avantaĝo estas, ke

la dokumentoj ja tutcerte *havas la saman enhavon*. Tial la kaŭzo de la diferenco de la statistikaj indikoj povas esti nur la malsameco de la lingvoj. Ĝia alia avantaĝo estas la multlingveco, ja ĝi aperis en ĉiuj oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio.

Prilaboro de la tekstoj

Mi forigis el la teksto la signojn de dispartigo kaj interpunkciado (indikoj pri alineoj, punkto, komo, ktp.). Mi prilaboris la purajn vortojn per la tabelmanipula programo *Excel*, tiel determinante la regresan linion.

La kalkulitaj Zipf-koeficientoj montras a) *bonan* kongruon ($R^2=0,73$) kun la rezultoj de Manaris eĉ kun la datumoj de la hispana kaj b) *bonegan* kongruon ($R^2=0,98$) sen la datumoj de la hispana:

	Bujdosó	Manaris
Esperanto	0,9632	0,9204
Germana	1,0105	0,9745
Itala	1,0168	0,9947
Hispana	1,0415	0,9255
Franca	1,0423	1,0448
Angla	1,1108	1,1858

Vicordo de lingvoj laŭ la Zipf-leĝo

Mi metis en vicordon la lingvojn laŭ la klino de la Zipf-linio. Tie vi povas vidi la jam menciitan valoron 0,96

Vidu la figuron de la vicordo de la lingvoj laŭ la klino de Zipf-linio en la apuda paĝo.

Sur tiu ĉi figuro estas ĉio perfekta. La baltaj, la slavaj, la ĝermanaj kaj la novlatinaj lingvoj estas unu apud la alia. Estas interesa la loko — proksima al la centro — de la malta (arabdevena) kaj la greka. Mi scivolus pri la analizo de la eŭska, la ivrita kaj la turka, se tiuj iam estus oficialaj lingvoj de EU. Esperanto estas la 11a inter la 21 lingvoj, t.e. ĝi estas en la mezmezo de la vico. Tio estis antaŭvidebla, konante la konstaton de profesoro Pennacchiotti: “La interna kohereco de Esperanto klariĝas do per tio, ke ĝi kapablas harmoniigi la postulojn de struktura simpleco, necesajn por

vasta internacia uzo, kun la konservado de preciza *tipologia* stampo, nome tiu de la *germanaj kaj slavaj* lingvoj de centra Eŭropo”. Mi ne povis reteni min de certa fiereco, eksciinte tion, ke per la Zipf leĝo mi povis pruvi tiun lingvistikan konstaton.

Sed la vera surprizo estas la loko de la hungara lingvo. Kiel eblas, ke la Zipf-kolino de la tri finnugraj lingvoj estas tiom proksimaj unu al alia? Ni ja scias, ke la hungara jam antaŭ plurmil jaroj disiĝis de la du aliaj parencaj lingvoj.

Mi volis trovi la lokon de Esperanto kaj fine mi trovis indikojn pri la pareneco de la finnugraj lingvoj. Mi pensas, ke la Zipf-leĝo estas tre potenca esplora rimedo.

Mi konigis tiun ĉi rezulton en la Kongreso de Asocio de Hungaraj Apliklingvistoj en 2006. Estis objekto de Pusztay János, katedrestra profesoro de uralistiko, ke eble la simileco ŝuldiĝas al la influo de la germana al la finnugraj lingvoj. Se oni esplorus paralelajn tekstojn de la ruslandaj kaj neruslandaj finnugraj lingvoj, oni povus decidi pri tiu ĉi afero.

Literaturo

Manaris et al. 2006: *Investigating esperanto's statistical proportions relative to other languages using neural networks and Zipf's law*. Proceedings of the 2006 IASTED International Conference on Artificial Intelligence and Applications (AIA 2006), February 13-16, Innsbruck, Austria.

Pennacchiotti, F. 1981: *Ne-hind-eŭropaj trajtoj de la internacia lingvo*, in: Sprachkybernetik, 1981, Paderborn, p. 95.

Pri la aŭtoro

Bujdosó Iván fariĝis elektra inĝeniero en Budapeŝta Teknika Universitato en 1968. Ekde 1973 ĝis 1994 laboris kiel komputisto ĉe: Elektra Aŭtomatiga Instituto, Hungara Esperanto-Asocio, Tutlanda Elektra Dispona Centro. Akiris instruistan diplomon ĉe ELTE pri lingvo kaj literaturo de Esperanto en 1993. Instruisto de komputaj sciencoj por postabiturientuloj (1994–1999). Ekde 1996 ekstera lekciisto en ELTE por esperantologiaj kaj apliklingvistikaj studentoj, ekde 1999 scienca helpkunlaboranto en ELTE ĝis emeritiĝo en 2006. Partopenis en deko da vortarfaraj projektoj, verkis konferencajn artikolojn, akiris PhD-gradon de doktoreco en 2004 per la disertaĵo: *Instruado de la planita lingvo Esperanto*.

Ne handikapo, sed atuto

Ĉiam mirigis min tiom da tempo-perdantoj en Esperantujo, tiom da polemikuloj pri negravaj aŭ malprioritataj temoj, ekzemple tiuj ple(n)dantaj pri la neceso reformi la Esperanto-alfabeton ĉar enhavanta ĉapelitajn literojn, tiuj, por kelkaj, tiom problemigaj literoj, tiom malfaciligantaj la “progreson de la lingvo”... tiom ĝenaj definitive.


Certe nia originala, specifa alfabeto iom tiklis nian paciencon: aĉetonte tajpilon mi devis iom pli butikumi ĝis trovi tiun kun Esperanto-supersignoj; akirante komputilon mi ne tuj povis klaki Esperant-lingve, tamen ne tro da tempo pasis ĝis kiam mi sukcesis akiri (senpage) taŭgan programeton por tion fari senprobleme; eldonante Esperantaĵojn, kelkfoje estis necesa provizi la presiston per la necesaj Esperanto-litertipoj (kiuj facile estis atingeblaj senpage), ktp.

Tamen, tion kion kelkaj konsiderus handikapo, niaj ĉapelitaj literoj, mi opinias aldona valorajo, ĉar alloga identiga specifaĵo, distingilo, precipe nuntempe en epoko tutmondiga, maldiferenciga. Oh, jes, mi scias, Esperanto ĉar internacia lingvo kia ĝi estas, jam sufiĉe unikas, sed bone, lingva komunumo — ankaŭ la Esperanta — bezonas tiajn identigilojn, krom evidente, niajn jam tradiciajn (stelo, flago, ktp).

Tiaj distingigiloj-identigiloj ekzistas ankaŭ ĉe naciaj lingvoj. Ekzemple, la litero “ñ”, nur ekzistanta en la hispana (mia naci-lingvo), dum jaroj “ĝenis” nin — en tiu ĉi diĝita epoko kie la komputikajn programojn superregas sensupersigna lingvo kia la angla — printiloj “rifuzis” ĝin presi, retadresoj malakceptis ĝin (ĝis antaŭ nur kelkaj monatoj!), ktp... kaj neniam mi aŭdis plendojn pri la neceso ĝin forigi, anstataŭigi, kiel ĉe esperantistoj pri siaj jam pli ol centjaraj ĉapelitaj literoj. Kontraŭe, la litero “ñ” fariĝis en Hispanio vera simbolo de la hispana lingvo kaj de la kulturo, kiu per ĝi esprimiĝas; ne maloftas vidi ĝin (laŭ diversaj grafikaj aranĝoj) kiel simbolon de oficialaj kulturaj aranĝoj — kelkfoje kiel simbolon de la lando mem — ĉe popularaj kulturaj produktoj (ekzemple, kompilaĵoj de hispanlingvaj muzikaĵoj, ...), sur T-ĉemizoj, ktp. Ekzemple: la registara institucio kiu okupiĝas pri la diskonigado internacie de la hispana lingvo kaj kulturo (“Instituto Cervantes”) enhavas ĉi-literon (pli ekzakte ties supersignon).

Do, kial ne uzi unu el niaj “pure” Esperantaj (ĉar ekzistantaj nur en Esperanto) supersignataj literoj, la “ĉ” (tiu —kun la “ĝ”— plej ofta), kiel unu plian identigilon-distingilon (ĉi-kaze malformalan!) de nia lingva komunumo? Literoj tiel akre diskutitaj kaj samtempe tiel pasie defenditaj en Esperantujo jam fariĝis atuto de nia komunuma historio, do, kial ne uzi ilin blazone? La grafikan aranĝon, kiun vi vidas apud ĉi teksto, mi trovis unuafoje en *Boletín* (№324, jaro 1996) de HEF (fakte nur la centran parton, ĉar la flankan tekston mi aldonis poste); la tuton mi trovas amuza kaj originala. Aldone ĝi povas havi tre interesajn “alternativojn” nur anstataŭante la “cilindran” ĉapelon per alia vakera, rusa (tiu cilindra el felo), turbano, ĉina-indoĉina, ktp...; pensu pri ili sur T-ĉemizoj de respektive usonano, ruso, arabo, ĉino, ktp, tiel informante pri la deveno de tiu esperantisto. Amuza ludo!

Iñaki Vélez (Hispanio)



Aliaj landoj, aliaj brandoj*

de Reinhard Haupenthal

Kiel regula gasto de Raymond Schwartz mi havis la raran privilegion rite ĝui postmenue lian unikan mirabel-brandon. Kiam, iu-tage, Joseph Nels petis de li “ankoraŭ glaseton de via likvoro”, Schwartz faris al li predikon pri moroj. Konfuzi brandon kun likvoro, jen morto-merita peko. Cetere, Schwartz ankoraŭ havis la distil-raĵton hereditan de sia patrino. Ne diste de sia lorena tombejo, li posedis mirabel-boskon, kie propramane li plukis la falintajn fruktojn plene maturajn kaj aromajn. Neniame plu, en la postaj jaroj, mi retrovis simil-gustan brandon kies koloro egalas, laŭ Schwartz, la urinion de sana viro...

Nu, en sia t.n. Naŭa Oficiala Aldono (OA) al la Universala Vortaro (bela bombasto, ĉu ne?) ia kungrupiĝo sin nomanta Akademio de Esperanto “oficialigis” la vortojn *aperitivo* kaj *vodko*. La hobiaj leksikologoj faris unu-flankajn selektojn (kiel iam Waringhien, kiu notis en sia PIV *bugri*, sed ne *midzi*). Kial, oni sin demandas, la vort-akumulaj akrobatoj donis preferon al aperitivo, sed ignoras la postmanĝan *digestivo* kaj kial *vodko* postlumas aliajn brandojn, sed tamen ne kulturenas la orfajn fratojn. Ni rigardu la aferon iom pli sisteme.

Jam en la 2a OA (1919) la drinkemaj akademianoj kanonizis *ĝino*, *kirŝo* kaj *viskio*, sed ial la *vodko* preterglitis. Aŭ ĉu mankis rusaj kundecidantoj? La nova PIV memoris pri la ekzisto de *slivovico* (prun-brando), kiun la svisoj nomas *Pflümli*, sed *pflimlio* malfacile prononceblas, malgraŭ la strangajo *muslio* kiu enŝteligis sam-vortare. La *konjako* estas

ekzemplo por tio, kiel toponimoj donas nomon al produktoj: edamo, grujero, kamemberto kaj rokforto, sed ankaŭ madejro, malago kaj tokajo. Tamen en la serio de la brandoj plu mankas *armanjako* (kvankam ne ĉe Krause) kaj *kalvadoso* (pom-brando el Normandujo).

La nomenklatura konfuzo grandas. Kio entute brandigebblas? Jen:

1. kern-fruktoj (cidonioj, piroj, pomoj...)
2. drupoj (abrikotoj, ĉerizoj, mirabeloj, persikoj, prunoj, pruneloj...)
3. beroj (arbutoj**, fragoj, framboj, sambukoj, juniperoj...)
4. radikoj (genciano...)
5. alkoholaĵoj kaj rekrementoj (biero, vino; elpremitaj vinberoj...)

El ĉi deven-substancoj pokaj brandoj akiris propran nomon:

- agava → tekilo
- ĉeriza → kirŝo
- grena → vodko
- hordea → viskio
- junipera → ĝino
- poma → kalvadoso (sed ne por ĉia pom-brando)
- pruna → slivovico (sed certe ne ĉia)
- vina → armanjako, konjako...

La brando el premitaj vin-beroj nomiĝas jen *grappa* (itale), jen *Trester* (germane), jen *marc* (france), kun aldono loka (ekz. *marc de Provence*) aŭ *vita* (ekz. *marc de Gewürztraminer*, Alsaco). Nia lingvo iom plumpas ĉi-rilate per la kilometra vinber-brando.

Se la brandoj prezentas bonan digestivon (kelkaj prefere en glaso fridigita per glaci-pecoj), ili estas eĉ taŭga ingredienco gastronomia: en Francujo oni parolas pri “truoĵ”: *trou normand* (pom-ŝorbeto arosita per pom-brando), *trou alsacien* (citrona ŝorbeto kun *marc de gewürztraminer*). Ĉi truoĵojn oni servas inter la pladoj, ne menu-fine.

Sed brandoj servas ankaŭ por flamumi: deserton, kotleton, krespon, rostajojn, stekon. Kaj bavara bier-suplo pliboniĝas, se oni baptas ĝin per bier-brando. Ili same prezentas bazon por grogaj kaj punĉoj. Domaĝe, ke nun-tempe pro rigoraj trafik-kontroloj (anstataŭ kalvadosiĝi, nia mondo kalviniĝas) ĉiuj timas la delicojn de bona brando. Eĉ la privata distilado kutime ne (de)licas. Tial jam en olimaj tempoj oni distilis dum la nokto-meza meso, kiam eĉ la sbiroj kirk-iris...

En Svislando, oni asertas, eĉ la posedo de distil-aparato, la alambiko, puneblas. Tio okazis al kamparano, kiun la ĝendarmoj pagigis, malgraŭ ties certigo, ke li tute ne distilis. Vi havas la instalaĵojn, ili insistis, tio sufiĉas. Anstataŭ la postulita cent-franka puno, li ŝovis al ili 200 frankojn kaj klarigis al la miraj reprezentantoj de la leĝo, ke li anoncas sinakuzon pro seks-delikto. Sed neniam oni vin kaptis ĉe freŝa faro, ili replikis. “Ne gravas, mi havas la instalaĵojn...”

Je via sano, sam-ideano!

* Artikolo anoncita en *La Ondo* 2007, №10, pĝ. 15.

** Strange, ke laŭ PIV kaj laŭ Krause *arbuto* estas arbo, dum efektive ĝi estas bero de arbut-arbo, arbutujo aŭ simple arbutiero. La portugaloj konas arbut-brandon.

Internacia Esperanto-Konferenco – 2008 en Slovenio, 12–18 jul 2008

Ŝempeter pri Gorici / Ŝempeter ĉe (Nova) Gorica

Temo: Fernando DE DIEGO, vivo kaj verkaro

Organizanto: Orbis Pictus de Viŝnja Brankovič, ✉ Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio ☎/fax +39/040 767875 ✉ orbispictus@iol.it

Konstanta adreso: Éric Laubacher, kasisto de OSIEK ✉ 1, rue de Bougainville, 78180 Montigny le Bretonneux, Francio ☎ +33 1 30 96 67 91 ✉ kasisto@osiek.org

inter Ljubljana (100 km) kaj Venecio (150 km)

en regiono de najbarbaroj Nova Gorica (Slovenio) kaj Gorizia (Italio) proksime al maro kaj montaro, mondfamaj grotoj...



Ĉiutagaj prelegoj sekvataj de debatoj. Libroservo Suspensa voĉdonado por OSIEK-premio 2008

bona internacia etoso de negranda aranĝo • favoraj kondiĉoj kaj prezoj • allogaj proksimaj ekskursceloj posttagmezaj ekskursetoj dum la konferenco

Postkonferencaj ekskursoj (dum tri tagoj) aŭ/kaj kunvojaĝo al 93a UK en Roterdamo! VI ESTU BONVENA!

Pri la infero

Recenza eseo de Sergio Pokrovskij

Ĉi tiu teksto aperas akompane al la recenzo pri la nova versio de *Biblio*, preparita de IKUE kaj KELI kaj eldonita de KAVA-PECH. La antaŭaj partoj aperis en *LOdE*, 2008, №1,2,3.

Postmorto en Tanaĥo

Tanaĥo promesas nenion bonan post la morto. Ĉiuj promesoj de la Eternulo al Abrahamo koncernas biologian pluvivon en la abunda posteularo, neniam temas pri individua senmorteco. Margene aperas mencioj pri Ŝeolo, kien malsupreniras la animoj de ĉiuj mortintoj, justuloj kaj pekuloj, la animisma infero samspeca kiel Hadeso ĉe Homero aŭ *Hel* ĉe la ĝermanoj; tie la fantomoj restas malliberaj, sen ĝuo — sed ankaŭ sen sufero, ili ja nenion sentas, kiel konvenas al la mortintoj. Estas neniam rekompenco aŭ puno. Komparu la respondon de Aĥilo al Odiseo, ke li preferus esti la plej mizera kampolaboristo sur la tero ol reĝo de Hadeso [*Odiseado* 11:489–491] kun la biblia konstato ke “eĉ al hundo vivanta estas pli bone, ol al leono mortinta” [*Pred* 9:4]. Ŝeolon egale trafas la justuloj [*Gn* 37:35] kiel la pekuloj [*Ps* 9:17].

Cetere, Biblio nenion rakontas pri tio, ke Dio kreus ian ajn inferon.

La buŝa Torao

La tradicio asertas, ke post la reveno el la Babela ekzilo, la tri lastaj Tanaĥaj aŭtoroj: Ezra, Neĥemja kaj Malaĥi, kolektis kaj fermis la Sanktan Kodekson (t.e. Tanaĥon). De tiam la profetado ĉesis en Izraelo. En la epoko de la Dua Templo novajn ideojn oni povis akceptigi nur prezentante ilin kiel antikvajn.

“La kaŝitaj libroj” (apokrifoj), pri kiuj mi parolis en antaŭa artikolo, malmulte prosperis. Pli sukcesa montriĝis simila ideo pri “la buŝa Torao”, pri tio, ke krom la skribitan Toraon Dio komunikis al Moseo iujn informojn buŝe. Laŭ la rabenoj, tion implicas *El* 34:27,

Kaj la Eternulo diris al Moseo: Skribu al vi ĉi tiujn vortojn, ĉar laŭ ĉi tiuj vortoj Mi faris interligon kun vi kaj kun Izrael.

Do, la kromajn vortojn konservas la buŝa tradicio popola. La anoj de la religia skolo, farinta la buŝan Toraon sia standardo kaj metodo, nomiĝis *fariseoj*.

El la buŝa Torao ili poste faris siajn Sanktajn Kodeksojn, interalie Talmudon.

La fariseoj konsiderinde mildigis la plej barbarajn preskribojn de Torao (sed tio ne estas nia nuna temo), kaj kontra-bandis religiajn ideojn de la najbaraj popoloj. Interalie, la nociojn pri la postmorta rekompenco en la *paradizo* kaj *Geheno*.

Etimologie “Geheno” devenas de Jerusalema loknomo plurfoje aperanta en Tanaĥo kiel “la valo de la filo de Hinom” (ekz-e *Jos* 15:8), ĉiam kiel indiko topografia (nun tie estas publika parko). Laŭ PIV Geheno estas “la infero de la postekzila hebrea kredo”; pli ĝuste estus kompari ĝin kun la katolikisma purgatorio, ĉar laŭ la moderna judismo averaĝa pekulo ne pasigas tie pli 12 monatojn; kaj ĝi pereos ĉe la mondofino. Do, tre malmulte ĝi similas la Gehenon evangelian.

Sadukeoj, fariseoj, kristanoj

La reganta klaso, kaj speciale la Templu pastraro, plejparte estis *sadukeoj*. Ili rigore sekvis la Luteran principon *Sola Scriptura*, kaj rezolute forĵetis ĉiajn fantaziojn de la “buŝa Torao”. La normojn de la skribita Leĝo ili interpretis laŭvorte kaj senindulge. Ili opiniis malnobla “ami Dion” en espero de rekompenco (aŭ antaŭtimante punon) — tio estas vendi sian amon kaj sin prostitui. La vera amo estas senkondiĉa, ne atendas rekompencon kaj ne timas suferon.

Ĉar la Sadukeoj diras, ke ne estas releviĝo, nek anĝelo, nek spirito; sed la Fariseoj konfesas ambaŭ [*Ag* 23:8].

La sadukea skolo pereis kun la Templo, dum du opoziciaj skoloj fariseaj, rabenismo kaj kristanismo, transvivis.

La orienta kristanismo

La senelira malliberejo de la mortintoj, Ŝeolo, restis tia ĝis la malsupreniro de la mortinta Kristo, kiu malfermis la

vojon de savo ankaŭ por la multaj generacioj da homoj pli frue mortintaj, justuloj kaj pekuloj, alportinte ankaŭ al ilian Evangelion [*1 Pet* 3:18–20, 4:6].

La ortodoksa liturgio¹ instruas, ke kiel ĉe la homoj, dummorte lia animo forlasis lian korpon:


La nobla Jozefo, de sur la kruco Vian plej puran korpon preninte, en puran tolaĵon kun mirho kaj aloo ĝin envolvis, kaj en sian novan tombon metis.

En la tombo korpe, en la infero anime, Die vi estis en la paradizo kun la rabisto, sur la trono kun la Patro kaj la Spirito, ho Kristo ĉion pleniganta kaj de nenio enfermata.

Kristo rompis la barojn de la infero kaj malfermis al ties kaptitoj vojon sur la ĉielon en la paradizon. De tiam la mortintoj ne iras ĉiuj en Ŝeolon, sed unue okazas la *individua juĝo*, laŭ kies verdikto la animo povas aŭ tuj eniri la paradizon — aŭ tamen malsupreniri en la inferon por provi la ŝancon ricevi “la bapton per fajro”. La pekulojn povas helpi preĝo; tial la Eklezio preĝas ankaŭ pri “la en la infero tenataj”.

Definitive la sorto de la ŝeolanoj estos decidita ĉe la Mondofino, dum la *Lasta juĝo*. Kun la mondo tiam pereos la nuna provizora infero:

kaj la morto kaj Hades liveris la mortintojn, kiuj estis en ili; kaj ĉiu estis juĝata laŭ siaj faroj. Kaj la morto kaj Hades estis ĵetitaj en la fajran lagon. Tio estas la dua morto — la fajra lago. [*Apok* 20:13–14].



La vorton “Geheno” oni kutime aplikas al ĉi tiu stato *post* la Lasta juĝo, kiam la infero kaj la morto estos ĵetitaj en la fajran lagon³. Kp *Mt* 10:28:

ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon; sed prefere timu Tiun, kiu povas pereigi kaj animon *kaj korpon* en Gehena.

La fajro

Fajro estas la plej konstante, eĉ obsede, menciata trajto de la novtestamentaj mencioj pri la turmenta infero, ekde la “forno de fajro” en *Mt* 13:50 ĝis “la fajra lago” en *Apok* 20:14. Sufiĉe frue oni rimarkis, ke la fajro estas ankaŭ konstanta simbolo de la Eternulo, ekde la “fajro konsumanta” [*Rd* 4:21, *Heb* 12:29] ĝis la pentekosta fajro [*Ag* 2:3]. Preĝo antaŭkomunia (laŭ Simeono la Nova Teologo, 11^a jc) parolas pri fajro de la eŭkaristiaj sanktaĵoj:

Fidante viajn malavarajn por ni bonfarojn, kun ĝojo kaj timo al fajro mi komuniĝas, mi la herbero, sen brulvundo malsoifigata, simila al la arbetaĵo neforbrulanta

(la bildon de herbo sen bruldifekto malsoifigata de fajro klarigas alia versio de la preĝo, menciante ke la Eternulo faris la fajron *roso* por la tri junuloj en la ardanta forno [*Dan* 3]). Do, Dio estas kiel fajro, la savo por la indaj la pereoj por la malindaj:

La komunio de Viaj sanktaj misteroj estu por mi ne por juĝo kaj kondamno, sed por savo de la animo kaj korpo¹.

Postmorte la animoj venas antaŭ Dion. Iuj banas en ĝuo pro la malfinia amo, gloro, lumo, potenco kaj vero de la Ĉiopova Dio. La aliaj suferas timegon kaj turmentojn pro ekzakte tiu sama kialo. Post interparoloj kun la Eternulo “la haŭto de la vizaĝo de Moseo lumradias” [*El* 34:35]; sed Semelo forbrulis kiam Zeŭso aperis antaŭ ŝi en sia vera gloro.

La doktrino pri la dieco de la gehena fajro estas eleganta kaj populara teodiceo — tamen mi neniam povis kompreni, kial la ĉiea Dia fajro ne egale suferigas la nekonvertitojn dum ilia vivo ĉi-monda?

Turmento kaj puno

Mi jam citis la PIV-an difinon de la 1^a senco de la vorto “infero”; jen estas la 2^a:

*infer/o (...) 2. † Loko, kie la kondamnitaj animoj de la pekuloj suferas eternan punon (...)


Io skrapetis mian okulon ĉe legado de ĉi tiu difino: “suferas eternan *punon* ...”. Mi dirus “turmenton”. Kaj same diras la kvar rusaj vortaroj sencodifinaj kiujn mi tuj konsultis (du komunlingvaj kaj du religiaj)! La lingva instinkto senkonscie notas la diferencon inter la *jurismo* de la okcidenta kristanismo kaj la metafiziko de la kristanismo orienta.

En la orienta koncepto Dio ne estas punanta torturisto; la turmenton kaŭzas la antagonismo inter la Dia fajro kaj la peka naturo de la suferanto. Se oni ŝovas fingron en bolakvon, la brogvundon kaŭzas ne puna intenco de la bolakvo, sed la natura ordo kaj onia propra malsaĝo. Dio ne bezonis ĵeti Satanon en la plejprofundon de Ŝeolo — tutsimple tiu plejprofundo estas la loko kiel eble plej malproksima de la Ĉielo; ankaŭ tie estas la brulanta Dio, sed malplej proksime.

En la Okcidento la romia jurismo trovis por si firman bazon en la jurismo de Torao: Dio estas justa, lia justeco ne povas lasi ian ajn pekon sen bonforma pekmalŝarĝo — aŭ puno. Tre harmonie, sed Kristo la Ŝafido estas tie superflua. Kial Dio, veninta por lasi sin krucumi pro niaj pekoj, tiel senkondiĉe nin amanta, konstruu por ni eternan torturejon kaj zorgu ke niaj suferoj estu teruraj kaj eternaj?

Krome, ĉar *la Dia justo* superas ĉion ajn, tial observi ĝin estas granda konsolo. La spektado de la justaj inferaj turmentoj estas unu el la ĝuoj de la paradizanoj. Tertuliano antaŭĝue bildigis la grandiozan spektaklon de la torturoj ĉe la Lasta juĝo [*De spectaculis*, 30]; similan konsolon povis trovi Lazaro sur la sino de Abrahamo [*Lk* 16:25]. Menciindas, ke el ĉiuj rolantoj la riĉulo sola antaŭkompatas siajn 5 fratojn, dum Abrahamo kaj Lazaro restas indiferentaj. Tion kompetente komentis la sankta papo Gregorio la Granda:

La puno per fajro ne estus perfekta, se la torturato ne antaŭtimus, ke liaj familianoj suferos la samon (perfecta poena in igne non esset, si non hoc quod ipse patitur etiam in suis timeret) ... La justuloj ĉiam vidos la pekulojn en turmento, kaj tio pliigos ilian ĝojon, ĉar ili vidos la malbonon kiun ili evitis ... La vido de la turmentoj ne malserenigos la feliĉon de la justaj animoj, ĉar kie malestas kompato al la mizeruloj la ĝojo de la feliĉuloj ne povas malkreski (ubi jam compassio miseræ non erit, minuire procul dubio beatorum lætitiæ non valebit) [Homilio 40^a pri Evangelio].



La ortodoksa ikono “Malsupreniro de Kristo en la inferon”. Kristo, krucumita vendrede kaj resurektonta dimanĉe, sabate malsupreniris en la inferon por elkonduki la justulojn (kelkaj kun nimboj). Li tenas la manon de Adamo. Eva staras ne kuraĝante tuŝi la Savinton.

Tamen jam Danto ne ĉiam estis sufiĉe firma katoliko por ĝui la vidon de inferaj suferoj [*Infero*, traduko de Kalocsay, 5:116–117]:

Francesca, ho, pri viaj dolorŝiroj ĝislarne sentas mi melankolion ...

La “provotempo” por la homoj estas limigita per ilia vivo ĉi-monda. La granda komputilo de la Ĉiela kancelario ne kapablas teni konton de ĉiuj karmoj. Laŭ “La katolika enciklopedio”,

Ĉar la malico de la homoj ne povas igi Dion plu kaj plu plilongigi la provperiodon kaj fojon post fojo, senfine, donadi al ili la povon decidi sian eternan sorton. Devigo tiaspeca malkonvenus al la digno de Dio, ĉar ĝi dependigus Lin je la kaprico de la homa malico kaj senigus Liajn minacojn je granda parto de ilia efikeco ... Dio do fiksas la finon de la ĉi-monda vivo, la momenton de la morto, kiel finon de la provado de homo. Ĉar tiam en nia vivo okazas esenca kaj unumomenta ŝanĝo: la animo kaj la korpo disiĝas. Neniu alia klare difinita momento de nia vivo estas egale grava ... Sekve, ĉiuj popoloj kredas, ke la demando pri la eterna rekompenco estas traktata tuj post la morto. Ĉi tiu tuthomara konvinko estas kroma pruvo de nia tezo.

Kaj fine, la ordo morala kaj socia ne estus sufiĉe sekura, se la homoj sciis, ke la provperiodo pluus postmorte³.

Post la morto okazas tuja individua juĝo, kiu jam definitive decidas ĉion: ĉu la animo iru en la inferon (la okcidenta

infero lasas nenian esperon) — aŭ estu savita (eventuale post kelka tempo en la purgatorio). La lasta juĝo por la mortintoj iĝas senseca formalajo, ne tiom juĝo kiom ekzekuto.

Problemo de la jurisma koncepto estas, ke ĝi estas maljusta. Finia homo en finia mondo, posedanta finiajn rimedojn povas fari nur finian, limigitan krimon aŭ pekon. Tamen la puno estos malfinia en la tempo kaj senmezura en sia intenso. Por akordigi jurismon kun justo necesas alia solvo (ekz-e metempsiĥozo).

Laŭ konata parolkliŝo, la morto liberigas la animon je la pekema korpo por pure spirita vivo.

Ne tiel en la Okcidento: ĝuste dum la korpa vivo la homoj estas “kiel dioj”⁴, moralaj subjektoj respondumaj pri siaj agoj, kies ĉiu paŝo estas grava por ilia pereado aŭ savo. Ne estas sciata, ĉu post la morto la okcidentaj animoj kapablas evolui, ĉu ili povas konvertiĝi — tamen tute certe ilia postmorta evoluo kaj ilia postmorta konduto, eĉ se ili ekzistas, estas absolute malgravaj por ilia sorto kaj neniam interesas la eklezion. Eĉ la romkatolika eklezio “neniam preĝas pri la damnitaj”³, ankoraŭ malpli la luteranoj aŭ kalvinanoj. La animoj ne plu estas aktivaj moralaj subjektoj, ili estas nur pasivaj objektoj de rekompenco — per ĝuo aŭ per sufero. Ili ne plu estas “kiel dioj”, morale ili estas kiel legomoj.

La suba gravuraĵo de Albrecht Dürer montras la okcident-kristanan komprenon de la Malsupreniro de Kristo en la inferon.



Sekve, laŭ Aŭgusteno kaj la tuta okcidenta kristanismo la Jesua prediko en la infero [1 Pet 4:6] estis vanaĵo, kiu ne povis savi la antaŭkristajn nejustulojn. Al ĉi tiuj li alportis ne savan evangelion, sed eternan malbenon. (Tamen la ikonoj pri la liberigo el la infero — ne nur orientaj, sed ankaŭ la okcidentaj — tradicie prezentas Kriston kun Adamo kaj Eva; malfacilas nomi *justuloj* la pragepatrojn, kies prapeko tiom draste difektis la naturon de la tuta homaro.)

Katolikismaj puninstitucioj

La ortodoksisma infero evoluas en la tempo: post la vizito de Kristo ĝi malfermiĝis al la Ĉielo; ĉe la mondfino ĝi pereas en la fajrolago kaj iĝos Geheno. La Roma eklezio preferis tiun tempan evoluon prezenti statike, apartigante en la Infero apartajn sekciojn. Tion, kion ortodoksismo vicigas en la tempo, la katolikismo apudmetas en la spaco.

La tanaĥa koncepto pri Ŝeolo estis parenca al ĥaoso: plena malordo (*Ijob* 10:22); la katolikisma infero estas strukturita regno kie regas siaspeca ordo, *la kontraŭordo*. En la infero estas 4 sekcioj³:

1. *La infero de la damnitaj*, kiun solan la okcidentanoj kutime nomas per la vorto “infero”.

2. *La limbo de la infanoj*, la malliberejo por tiuj kiuj mortas sen alia peko krom la prapeko de Adamo kaj Eva, kaj kiuj suferas tie “ian specon de puno”³ — aŭ eble restadas tie en la stato de la “natura ĝojo” (laŭ Tomaso la Akvinano).

3. *La limbo de la prapatroj*, aŭ “la sino de Abrahamo”, estas loko kie la justuloj mortintaj antaŭ Kristo atendis, ke la Ĉielo akceptu ilin.

4. *La purgatorio* — purigejo kie la mortintaj en graco, sed ne finpagintaj la punŭldojn pro la pardoneblaj pekoj, elaĉetas tiujn ŝuldojn per kelkatempa sufero antaŭ ol la Ĉielo akceptos ilin.

Lastatempe Vatikano esprimis dubojn pri la Limbo de la infanoj; cetero, male ol la infero de la damnitaj kaj la purgatorio, tiu Limbo neniam estis dogmo. Krome, dum la pasinta jarcento oni preferis prezenti la inferon kaj la purgatorion ne plu kiel lokojn, sed kiel statojn.

La apartigo de la purgatorio estas relative malfrua afero. La termino *purgatorium* aperas en la 12^a jc. Por pruvi antikvecon de la koncepto la katolikaj aŭtoroj abunde citas atestojn pri la

preĝoj por la mortintoj; tio tamen estas alia afero: en ortodoksismo tiaj preĝoj ĉiam ekzistis, sed neniam estis tia dispartigo de la infero.

La purgatorio iom similas la ortodoksisman inferon; tamen ankaŭ la diferencoj estas grandaj. La animoj en la purgatorio jam estas destinitaj por la paradizo; en la infero ortodoksa nenio estas definitiva. En la ortodoksisma infero la suferoj povas konduki al savo per eduko turnanta la pekan animon al Dio; en la romkatolika purgatorio temas ne pri eduko sed pri reguligo de kontoj.

En la surskribo de la inferpordego (laŭ Danto/Kalocsay):

*Tra mi vi venas urbon de turmento,
tra mi vi venas en dolor' ĉiama,
tra mi vi venas al damnita gento.
Aŭtoron mian gvidis justo flama,
la Dia Povo kreis min en kaŝo
kaj Ĉefa Saĝo kaj Praforto Ama.
Ne estis antaŭ mi kreita aĵo
krom la eternaj; mi eterne staras.
Ĉiun esperon lasu ĉe l' enpaŝo.*

ni vidas la tipe okcidentajn *juston flaman*, kreon fare de Dio (Povo, Saĝo kaj Praforto supozeble aludas la Triunupon), eternecon de la nuna infero (malgraŭ Apokalipso) kaj la senesperon.

La infero protestanta

La doktrinoj protestantaj estas tiom senlime diversaj, ke maleblas prezenti ilin kiel unu tuton. En ĉi tiu artikolo mi uzas la vorton “protestanta” celante la branĉojn ne tro malproksimajn disde luterismo kaj kalvinismo.

Proklamita celo de la Reformacio estis reveno al la “nedifektita” antikva eklezio de la apostoloj. Kurioze, forlante la “deviojn” de la katolikisma tradicio la protestantoj restis en la sama sistemo de nocioj, en la samaj okcidentaj konceptoj, kiel ilia kontraŭulo la Roma Eklezio. Interalie, la protestantoj abolis la klare katolikisman purgatorion kaj la skandalan komercon per indulgencoj; sed ili restis ĉe la egale katolikisma koncepto pri la senlira infero, kiun ili lasis reduktita al la infero de damnitaj; ili restis ĉe la definitiva individua juĝo (kaj la kalvinanoj eĉ pli malesperigis la homan sorton per antaŭdestinismo). Fuĝante la “deviojn” de la katolikismo, ili fakte venis ĝis ilia okcidenta ekstremo.

Paradokse, la pli granda rolo de la Skribo en protestantismo kondukis al ia inflacio de ĝia teksto. Ĝi ne plu estas bazo de fiksita liturgio (malkiel en ortodoksismo); ĉiam plu ĝi iĝadis objekto de

studo plie histori-filologia ol teologia. Ofte distingado de vortoj anstataŭas studon de konceptoj (kiel pri Ŝeolo/Hadeso en LB).

Infero, Ŝeolo, Hadeso, Geheno

La bibliaj informoj pri la infero estas magraj kaj malkoheraj. Diversaj konfesus diversmaniere provas ilin koherigi. La rezultoj estas tre malsimilaj.

Temas pri evoluanta koncepto pri fenomeno evoluanta. Ĉar en kristanismo la infero ja evoluas kaj havas sian historion: la malsupreniro de Kristo draste ŝanĝis ĝian funkcion kaj staton; ĉe la onta Lasta juĝo la nuna provizora infero pereos. Do, la infero ne estas objekto senŝanĝa.

La tradiciaj tradukoj de Biblio — ekz-e Vulgato — klare atestas, ke la antikva Eklezio perceptis la inferon kiel tian unu koncepton, multfacetan kaj evoluantan. Simile *Jerusalemo* estas unu sama koncepto, malgraŭ ke la urbo de Salomono, de la Dua Templo, la romia *Ælia Capitolina*, la araba Al-Kuds ktp estas malsamaj — kaj tamen ili estas unu samo.

Fine de la mezepoko la okcidentanoj dispartigis la inferon en plurajn lokojn, kaj specialigis la vorton “infero” por unu el tiaj partoj; la protestantoj forĵetis ĉiujn ceterajn partojn; post kio evidentigis, ke la sankta historio malakordas kun ilia nociaro. Ke la nociaro estas malkonvena estis nepensebla; restis du ebloj: deklari Vulgaton erara kaj prezenti la interrespondajn vortojn hebrean kaj grekan kiel malsamajn nociojn; aŭ korekti la sanktan historion, ekz-e pri la malsupreniro de Kristo en la inferon. Ambaŭ eblojn oni provis.

La merkato kaj la biblioscienco

Ses jarojn antaŭ Esperanto, en la jaro 1881^a, okazis la unua radikala revizio de KJV, la norma anglalingva Biblio Jakoba. Baldaŭ poste (1901) ĝin sekvis la Usona *American Standard Version*. Poste ekpluvis *Weymouth*, *Williams*, *Moffat*, *Beck*, *Goodspeed*, *Twentieth Century*, *the Revised Standard Version*, *The New English*, *Amplified*, *Berkley*, *Phillips*, *Wuest*, *Living*, *New American*, *Good News*, *Jerusalem*, *New International*, *New King James* ... pli ol 70 tradukoj dum la 20^a jc. Evidente, ĉiu pretendis prezenti la plej ĵuse trovitajn plej antikvajn fontojn kaj la plej novajn rezultojn de la biblioscienco.

En tiu biblia negoco la komercaj interesoj de la eldonejoj kaj la karieraj

interesoj de la biblioscienlistoj koincidas: kompromiti la Tradicion por vendi *sian* Biblion. La merkata politiko malstabiligas la biblian tekston; estas amuza vidi, kiel en vica biblia varo la biblia scienco donas novan tradukon de unu sama peco, malsaman ol tiu de aliaj varoj egale “sciencaj”.

Tiu lavango evidente influis la britajn editorojn, kiuj publike prezentis la Londonan Biblion en la jaro 1926^a. Sur la esperanta merkato ne estis konkurado, tamen en la Brituja publika opinio jam regis la biblioscienco. Tute ĵuse indulgeme diris al mi protestanta pastoro:

Komprenoble, Zamenhof ne estis teologo, nek povis koni la tiam ĵus estiĝantan modernan bibliosciencon.

Naiva opinio. Ne temas pri moderneco aŭ sciencoco, temas pri principoj tradukaj kaj teologiaj.

Laŭvortisma traduko simila al “Hono havas alkuŝigi” kompare kun “Mi havas la honoron raporti al vi” ne estas “pli scienca”, ĝi laŭas alian tradukprincipon. S-ta Hieronimo certe komprenis la konceptajn diferencojn — sed ankaŭ la similaĵojn! — inter la hebrea Ŝeolo kaj la greka Hadeso; kaj li unuece tradukis ilin ambaŭ per la latina *infernus*. Evidente, se la Esperantan Biblion eldonus societo alilanda kaj alikonfesia, la ŝanĝoj en la Zamenhofa traduko povus esti malpli grandaj kaj eble eĉ alidirektaj. Mi faris Komparan tabelon da tradukoj de 4 elektitaj lokoj, laŭ la “modernaj” Biblioj anglalingvaj; kaj mi aldonis la tradukojn de la norma Biblio slavona.

La traduko slavona de antaŭ mil jaroj ŝajnas al mi supera ol la fruktoj de “la moderna biblioscienco”. Ĝi apartigas

konceptojn — la (nuna provizora) infero kaj la onta Geheno; kaj ĝia uzo estas konforma al la komuna uzo de la vorto “infero” kaj en la liturgio, kaj en la ĝenerala kulturo.

Kiel traduki la titolon “Infero” en la “Dia komedio” de Danto? Normale oni tradukas per “Infero”. Sed la pliparto de la anglaj tradukoj en la Kompara tabelo rezervas la respondan vorton *hell* por Geheno — kio (almenaŭ laŭ la tradicio ortodoksa) estas onta stadio. Laŭ LB oni probable devus traduki la titolon de la poemo de Danto per “Hades”. Sed se kontroli la realajn tradukojn anglalingvajn, ni trovos, ke ili lasas la titolon netradukita. France estas “L’Enfer”, ruse estas “Ад” — sed angle kaj germane “Infero”. Ŝajnas ke ĉi tiuj du lingvoj malhavas taŭgan vorton por traduki. Tutcerte tia netradukiteco estas malakceptebla en Esperanto. (Verdire, ankaŭ la aliaj partotitoloj estas sentradukaj en la angla, eĉ la senproblema “Paradiso”; supozeble por stila unueco necesus trakti la paradizon laŭ la maniero infera. Je alia nivelo tia problemo ne ekzistas, kaj oni ja tradukas: *The Divine Comedy*.)

Notoj

1. La liturgio de s-ta Johano la Orbuŝa.
2. Помазанский Н. Православное догматическое богословие. Новосибирск: Благовест, 1993. С. 221.
3. The Catholic Encyclopedia, art. “Hell”. Vol. VII. New York, 1910. Rete legebla ĉe <http://www.newadvent.org/>.
4. Malfacila tradukproblemo: Ĉu traduki en *Gen* 3:5 laŭvorte kaj tradicie: “kiel dioj”, aŭ monoteisme laŭ LB “kiel Dio”?

Kompara tabelo da tradukoj

	Jaro	Acts 2:27	Ps 16:10	Lk 16:23	Mt 5:29
YLT	1898	hades	Sheol	hades	gehenna
LB, KB	1926	Hades	Ŝeol	Hades	Gehena
NKJV®	1982	Hades	Sheol	Hades	hell
NIV	1984	grave		hell	
KJ21®	1994	hell			
NASB	1995	Hades	Sheol	Hades	hell
TNIV®	2005	realm of the dead		Hades	hell
Slavone	9 ^a jc	во адѣ (en la infero)			въ геену

YLT: Young’s Literal Translation
 KJ21®: 21st Century King James Version
 TNIV®: Today’s New International Version)
 NASB: New American Standard Bible

Fundamento de Esperanto


La *Fundamento de Esperanto* estas baza libro de Zamenhof, eldonita en printempo 1905 kaj oficialigita per la 4a artikolo de la Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo (la Bulonja Deklaracio), kiu estis aprobita 9 aŭg 1905 en la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar. En tiu Deklaracio la *Fundamento* estis proklamita netuŝebla bazo de la lingvo Esperanto, en kiu neniu rajtas fari kian ajn ŝanĝon.

La *Fundamento* konsistas el kvar integraj ĉefpartoj: Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro. En la Antaŭparolo la aŭtoro de la *Fundamento* skribis, ke la tri elementoj — Gramatiko, Ekzercaro kaj Vortaro — jam de longe fariĝis laŭ silenta interkonsento la fundamento de Esperanto. Tio estis la senpera kaŭzo de la eldono de tiuj dokumentoj sub komuna titolo. Por la lingvo Esperanto la *Fundamento* estas speco de leĝo, konstitucio aŭ sistembazo, kiu difinas, kio validas en Esperanto kaj, sekve, kio ne validas.

La Antaŭparolo estas la enkonduko al la *Fundamento*. Ĝi reguligas la institucian vojon kaj la procedon de la lingvoevoluo.

La rolo de la *Fundamento*, priskribita en la Antaŭparolo, estas servi kiel “netuŝebla gvida dokumento”, kiun neniu havas la rajton ŝanĝi, kio estas absoluta kondiĉo por la unueco de la lingvo. La alvokon ne tuŝi la *Fundamenton* Zamenhof ripetas plurfoje: “Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto”. Fakte nur kiam Esperanto estos oficiale akceptita de “aŭtoritata komitato interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj”.

Zamenhof komprenis, ke “severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kondiĉo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta”. Do, skribis Zamenhof, “ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; kaj ĉio, kio estas



kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem”. La akraj disputoj pri lingvaj reformoj el la jaro 1894 ne estis forgesitaj, kaj Zamenhof konsciis kaj timis, ke en ajna momento lingvaj disputoj povos ree eksplodi. Do, la *Fundamento* “devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj”, — admonis Zamenhof, sed la erareco koncernis precipe la naciajn tradukojn.

Malgraŭ la netuŝebleco de la *Fundamento* Zamenhof antaŭvidis, ke Esperanto “havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed ankaŭ konstante pliboniĝadi kaj perfektiĝadi”. Kaj li klarigas pli detale, kion li komprenas sub riĉiĝadi kaj perfektiĝadi. Sed: “La Fundamento de Esperanto devas troviĝi en la manoj de ĉiuj esperantistoj kiel konstanta ‘kontrolilo’, kiu gardos lin de la deflankiĝado de la vojo de unueco”. Per tri resumaj frazoj li reemfazis la plej gravajn principojn de la Fundamento kaj aldonis, ke la ideoj, kiujn li esprimis pri la *Fundamento*, prezentis dume nur lian privatan opinion. Sed leĝan sankcion ili ja ricevis en la Bulonja kongreso, al kiu la Fundamento kun sia antaŭparolo estis prezentita. Surbaze de § 4 frazo 3 de la Bulonja Deklaracio la Antaŭparolo fariĝis parto de la *Fundamento*, sen ke la vortoj kaj gramatikaj reguloj uzataj en ĝi apartenas al la Esperanto-normo — tio okazis nur per pli malfrua oficiala aldonado. Ke Zamenhof ege serioze konsideris sian Antaŭparolon al la *Fundamento*, li konfirmis en

artikolo verkita en la jaro 1907 (OV II-124), kie li skribis, ke la klarigoj en la Antaŭparolo estis longatempe pripensitaj.

La Fundamenta Gramatiko estas la baza gramatiko de Esperanto en formo de 16 reguloj. Aliaj reguloj estas menciitaj eksplicite en la Ekzercaro aŭ donitaj implicite tra la lingvouzado en la unuopaj partoj de la Fundamento. La Fundamenta Gramatiko estas parto de la *Unua Libro* (1887). La plej ekzakta ellaboro estas la angla versio.

La Gramatiko konsistas el la partoj A (la alfabeto kun kelkaj prononcaj klarigoj), B (partoj de la parolo, reguloj 1-8) kaj C (Ĝeneralaj reguloj, reguloj 9-16).

La 16 reguloj priskribas la sekvajn partojn de la lingvo:

1. artikolo, 2. substantivo, 3. adjektivo, 4. numeraloj, 5. personaj pronomoj, 6. verboj, 7. adverboj, 8. prepozicioj, 9. prononco, 10. akcento, 11. kunmetitaj vortoj, 12. negacio, 13. indikado de movoj, 14. prepozicio “je”, 15. fremdvortoj, 16. apostrofoj.

La Ekzercaro estas la ekzercakolekto de la *Fundamento*. Ĝi aperis meze de 1894 kaj konsistas el 42 paragrafoj aŭ ĉapitroj, kiuj enhavas kune plurajn centojn da ekzercofrazoj kun klariga vortareto. Ĉi tiuj frazoj ilustru la 16 regulojn. Paragrafoj 11, 13, 15, 17, 19, 21 kaj 23 dividas inter si la fabelon *La Feino*.

La Universala Vortaro aperis fine de aŭgusto 1893 kaj enhavis krom la ĉirkaŭ 920 vortradikoj de la *Unua Libro* aldonajn proksimume 1710 novajn vortradikojn en la tradukoj franca, angla, germana, rusa kaj pola. Ekzemplo: *instru* | instruire, enseigner | instruct, teach | lehren | учить | учу́. Ŝanĝoj ne estas permesataj, kun escepto de oficialaj aldonoj, kiuj estas deciditaj de la Akademio de Esperanto.

La *Fundamento* estis poste reeldonita, evidente ne ĉiam oficiale. La 11a eldono aperis ĉe *Edistudio* (2007). Krome estis eldonitaj pluraj nacilingvaj versioj. La oftaj reeldonoj pravas, ke la *Fundamento de Esperanto* estas baza dokumento, kiun devus koni ĉiu lernanto de Esperanto kaj kompreneble ankaŭ ĉiu esperantisto.

La *Fundamento de Esperanto* povas esti konsultita en la retejo de la Akademio de Esperanto:

<http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/index.html>

Andreas Künzli

Esperanto en muziko: ne nur en Esperantujo (5)

Mi revenas por daŭrigi la prezentadon de artistoj, kiuj jen malkovras ke Esperanto ekzistas kaj donas ĉi tiun nomon al si mem aŭ al siaj verkoj, aŭ eĉ kuraĝas kanti en Esperanto.

El Ligno Trio klasikumas

La triopo estis kreita en 2002 en la muzikmedio de Goiânia per tri gitaristoj: João Batista Albernaz, Rafael Milhomem kaj João Fernandes kaj perkutisto Wallace Patriarca en tri muzikoj de la unua KD. Laŭ ili, la ideo de la nomo venis de Esperanto, kun la signifo, ke ĝi venis de ligno aŭ estas farita el ligno, oni povas fari analogion kun la araba vorto *al ud* aŭ liuto (gitaro-pionira muzikilo) kaj ankaŭ signifas *ligno*. En septembro 2006 estis lanĉita la unua KD.



Rafael Milhomem naskiĝis 1 jul 1981 en Gojanja-Gojas' (Brazilo). Komencis muziklernadon kun privataj lecionoj de klavaro kaj trumpeto; la gitaro alvenis poste kun instruisto Clévio José Vieira en Centro Libera de Arto (CLA) kaj poste en Kultura Centro *Gustav Ritter*. Li diplomiĝis pri gitaro ĉe Universitato Federacia de Gojas' en 2003, ricevinte lecionojn de la gitaristoj Rodrigo Carvalho, Pedro Martelli kaj Eduardo Meirinhos. Rafael partoprenis en multaj muzikkursoj, interalie, de John Holmquist (Usono), Luz Maria Bobadilha (Paragvajo), Andrés Tápia (Kosta-Riko). Nun li agas kiel komponisto, muzikaranĝisto kaj muzikisto, kiel gitaristo en la grupoj *Sunroad*, *Euphony* kaj akustikgitaristo en *El Ligno Trio* kaj *Alma Brasileira*. En la akompano de la gitaristo Rafael Muniz (Kadriya), Milhomem prezentis la projekton *baRok'* — “vigla-peza metalo” plena de elementoj barokaj kaj klasikaj, kantita en Esperanto, kun partopreno de pluraj kantistoj de la gojanja muzika medio.

<http://www.myspace.com/rafaelmilhomemoficial>

<http://www.myspace.com/ellignotrio>



La blusa Doktoro Kverkradiko

“Malglatajn kantojn per kapricaj hejmkonstruitaj gitaroj”, laŭ lia propra esprimo, plenumas Doctor Oakroot (= Doktoro Kverkradiko). Naskiĝinta en taksio senbremsa, li diras, “mi ruliĝis de tiam. Mi ruliĝis rekte al la infero, levis la diablon per la vosto, kaj reportis iom da mallumegaj kantoj”.

Nekontenta pri ordinaraĵoj, D-ro Kverkradiko verkis muzikon per gitaroj memkonstruitaj el cigarskatoloj. Kiam oni ludas per skatolo, bastono kaj kordo, oni ne povas kaŝiĝi kaj la muziko estas neordinara. Okaze, li kantas blusojn ankaŭ en Esperanto.

<http://www.myspace.com/doctoroakroot>

Inter diro kaj fano

La Madrida povpopa bando *Tupelepone* ekkantas en Esperanto. La kantisto Pepe estas esperantisto, kaj li faris la provan kanton *Inter diro kaj fano*. Estas eta alproksimiĝo al la internacia lingvo Esperanto, uzante faman refrenon konatan en Hispanio... Certe venos io plia.

<http://www.myspace.com/tupelopone>

La aŭtuno de mia interno...

La ruslanda vioonlistino kaj pianistino Noita-Akka (Julia) el Peterburgo lanĉis sin en la elektronikan projekton *SynthSenses*. Noita-Akka komencis okupiĝi pri muziko, kiam ŝi estis kvinjara. Ŝi plenumis studojn en muzika lernejo (klaso de violono kaj piano). Sed nun komponado estas ŝia ŝatokupo... Ŝiaj unuaj komponaĵoj en Esperanto aperis en *Myspace*...

<http://www.myspace.com/synthsensesoff>

Esperanto Kuba

El Londono, ili nomas sin *Esperanto*, ĉar ili enkarnigas ĉefe miksaĵon de mondmuzikaj ĝenroj, kiu ŝajnas al ili taŭga por la epoko. La unua albumo estas *Esperanto Kuba*. La venonta albumo estos *Esperanto Afrika*.

Helicopter Girl verkas la muzikon kaj la tekstojn, kaj kantas. Ike Nossel (sube sur la foto) ludas preskaŭ ĉion, produktas kaj realigas.

La kantoj estas laŭ karibiaj influoj kun kanto-miksaĵo en la angla kaj hispana. Ili ĵus finpretigis sian unuan albumon kaj esperas fari turneon en Britio kaj Eŭropo.

<http://www.myspace.com/esperantocuba>




eSPeRaNTo: poprokbando el Romo

La projekto eSPeRaNTo naskiĝis en la jaro 2006a. Kaj sekvajare la bando registris la Kodiskon “Attraverso un oceano di sale” (Trans oceano de salo) kun 12 kantoj fluktuantaj inter popo kaj roko.

La bando konsistas el Silvia Puddu (voĉo), Alberto Marino (akustika gitaro, voĉo, tekstoj kaj muziko), Gianni Ferretti (klavaroj kaj programado), Daniele Giovannoni (drumo), Alex Massari (elektra gitaro), Gianni Sebastianelli (basgitaro).

<http://www.myspace.com/discoesperanto>





... kaj el Japanio

En 2003 Mashiro ekaktivis muzike. Li estas basgitaristo kaj kantisto. Mashiro partoprenis diversajn bandojn, sed fine kun aliaj muzikistoj li starigis la bandon *Esperanto*, kiu en 2006 kontribuis titolon al la kompilo *Japan Indies Omunibus Vol. 1* kaj sekve aperigis sian unuan demodiskon. Samjare Akira (drumo kaj koruskanto el la eksa bando *Mechallica*) venis en *Esperanton*, kaj ili tuj eldonis unuan minialbumon.

Poste aliĝis gitaristo Takanori, kaj lia alveno fiksas la definitivan aktualan konsiston de la poproka triopo *Esperanto*. Ili faris la duan demon, publikigis muzikon en nova kompilo titolita *Muzic Communication 01* kaj laste aperigis la duan minialbumon kaj samtempe ankaŭ aperis en alia rok-kompilo.

Esperanto koncertas ofte en japanaj rokkluboj kaj festivaloj, kantante en la japana.

<http://www.myspace.com/esperanto3>

Du neesperantaj Esperantoj

Elektronika/tekna bando el Kaŭno en Litovio... Du superuloj angle kantas elektronike laŭ avangardaj kaj eksperimentaj tekno-sonoj.

<http://www.myspace.com/esperantas>

Akustika muzikfandiĝ-progresiva bando el Bonaero (Argentino) konsistas el Germán Taylor (voĉo, klavaroj, gitaro), Nicolás Rodríguez König (gitaroj), Nicolás Grillo (basgitaro), Alejandro Hagopian (drumo). Ili kantas hispane.

<http://www.myspace.com/esperantogrupo>

Ĉi tiujn kaj aliajn malkovrindajn artistojn kaj bandojn vi trovos en la mia-spaca paĝo ĉe la ĉefamarko en

<http://www.myspace.com/vinilkosmo>

Kiberspacomadis por vi

Flo!

Por ke niaj posteuloj havu ĝojon lerni Esperanton...

Esperanto kaj mi: Eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj / Komp., antaŭpar. Hori Jasuo. — Maebaŝi: Horizonte, 2007. — 207 pĝ., il.

Foje nian hejmon vizitis esperantisto el fororienta ruslanda regiono. Dum la interparolo li insistis, ke ni proponu trafajn argumentojn por la okupiĝo pri Esperanto. Tiujn li bezonis por defendi sin kontraŭ mokado de siaj samfamilianoj kaj konatoj. Efektive, ĉu esperantisto bezonas iajn sinpravigojn aŭ pli gravas, ke li/ŝi sentas Esperanton nedisigebla parto de sia vivo.

Hori Jasuo, konata japana aktivulo (interalie, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado dum ses jaroj), spertis progreson de la azia movado, kiu havas siajn proprajn organojn kaj kongresojn. La esperantistoj en Azio ne plu estas izolitaj. Sed por kreskigo de solidara sento Hori Jasuo iniciatis kolekti eseojn pri la temo “Esperanto kaj mi”.

Li sukcesis kolekti 180 eseojn el 17 aziaj landoj kaj 2 el eksteraziaj. Ilin verkis konataj aktivuloj kaj ĵusaj komencintoj, de 16-jarulo ĝis 97-jarulo. Kelkaj kontribuintoj donis titolon al sia eseo, sed la plimulton titolis la redaktoro. Li ne multe korektis la tekstojn, ĉar li “ne volis malhelpi la entuziasmon elŝpruci el la eseoj”. La plej multaj eseoj venas el Japanio (54), sekvas Pakistano kun 33 eseoj, sed tiuj estas ĉefe kelkliniaj kaj similas al kursotasko. Mirigas, ke estas nur unusola ruslanda kontribuanto (de vladivostokano, laboranta en Japanio), kvankam plejparto de Ruslando, de Uralo ĝis Pacifiko, situas en Azio.

Ĉiu kontribuanto havas similan strukturon, kiu fontas el la submetitaj demandoj: Kial vi eklernis Esperanton? Kial vi lernas ĝin ĝis nun? Kion vi esperas de Esperanto? Sed ĉiu respondas en sia maniero. El tiuj respondoj oni povas ĉerpi inspiron por daŭra laboro por Esperanto. Ofte intereso pri lingvoj kaj vojaĝoj venigas homojn al Esperanto; estas alte aprezata eblo de senpera komunikado, eblo kompreni vivojn kaj kulturojn de diversaj popoloj. Idealoj de Zamenhof resonas en multaj animoj.

Jen mallonga ĉerpo el la rezonoj, kiuj renkonteblas ĉiupaĝe.

“Per Esperanto mi havis multajn mirindajn spertojn. Esperanto vere donis al mi multe sed mi ankoraŭ ne povas redoni al ĝi multe. Nun Esperanto estas parto de mia vivo kaj estas en mia sango, do mi laboros fortege por la evoluo de la movado.” (Santos Karko, 21-jara, Nepalo)

“Dank’ al Esperanto mi povis havi multajn bonajn spertojn kaj amikojn. Pro tio mi volas daŭre farti bone en Esperantujo. Esperanto donas brilan lumon al mia maljuneco.” (Ooŝima Ĵunko, 65-jara, Japanio)

Kaj fine, la vortoj de Hori Jasuo: “... mi laboros por Esperanto por ke niaj posteuloj havu ĝojon lerni Esperanton, renkontiĝi kun eksterlandaj amikoj kaj ĝui la pacan mondon. Mi kredas, ke Esperanto estas la plej granda inventaĵo de kaj por la homaro, tial estas granda feliĉo por mi dediĉi mian vivon por la idealo”.

Halina Gorecka

La unua kajero de “Spegulo” aperis

La unuan kajeron de la soci-kultura revuo *Spegulo* malfermas (ĉef)redaktora artikolo de Tomasz Chmielik, en kiu li emfazas la komunan sperton de la jaro 1989, kiu ligas redaktorojn kaj kunlaborantojn, ĉefe polajn. Li alvokas studi la situacion en Orienta Eŭropo, kiu ekestis post drastaj ŝanĝoj, kaj promesas kunlaboron de neesperantistaj fakuloj pri orient-eŭropaj problemoj.

La internacian jaron de lingvoj omaĝas prelego *Universala Deklaro de Lingvaj Rajtoj kaj genocido de lingvoj*, kiun Éva Tóth faris en la konsultiĝo de la Verkista Tendaro en Hungario.

Originalan literaturon reprezentas per fragmentoj el verkataj romanoj Trevor Steel kaj Mikaelo Bronŝtejn kaj mallonga rakonto de israelano Luiza Carol. Pola literaturo ĉeestas per poemo de Julian Tuwim *La balo en opero*, tradukita de Lidia Ligeza kaj enkondukita de Tomasz Chmielik.

Tomasz S. Chmielik (la filo) aŭtoris du artikolojn pri kino-arto. Kompilaĵo de Jerzy O. konigas la bluso-majstrinon Dinah Washington. Luiza Carol rakontas pri teatra kaj filmprodukta kariero de sia samlandano Gian Piero Savio.

Tomasz Chmielik recenzas la libron de Ruben Gallego *Blanko sur nigro* kaj Andreas Künzli la germanlingvan romanon de Dagmar Leupold *Grüner Engel, blaues Land*, kies temo estas Esperanto.

Halina Gorecka

Invito al malfacila historio

Эсперанто-движение: Фрагменты истории / О.И. Красников. История Союза Эсперантистов Советских Республик (СЭСР); Д.Бланке. История рабочего эсперанто-движения; Сост. и пер. с эсперанто А.Сидорова. — М.: Импэто, 2008. — 216 с., ил.; 400 экз.

Dank' al diversaj prihistoriaj studoj (Lins, Korĵenkov, Vuljfoviĉ, Stepanov k.a.) iom konata iĝis la agado de esperantistoj en frua Sovetunio kaj ilia tragika sorto dum la stalinisma epoko, kiam Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), estis fermita kaj centraj protagonistoj (Drezen k.a.) arestitaj kaj mortpafitaj.

La ruslingva historio de SEU, verkita de Oleg Krasnikov (naskiĝinta en la jaro 1937!), estas la rezulto de liaj multjaraj esploroj en la regiona muzeo de la urbo Kirov, en kiu troviĝas protokoloj de kunsidoj de la Centra Komitato de SEU, informleteroj, korespondaĵoj, ankaŭ gazetoj kaj revuoj de SEU kaj libroj (duagradaj fontoj).

Fruktodona laboro malgraŭ ideologiaj disputoj

Post enkonduko al la historio de la Esperanto-movado en Ruslando antaŭ 1917, Krasnikov analizas la evoluon de SEU laŭ jarperiodaj ĉapitroj (1921–26, 1926–28, 1928–31, 1931–35, 1936–37). Lia priskribo estas verkita kadre de la historia kaj politika kunteksto, en kiu SEU agis en Sovetunio. Signifa parto de la historia skizo estas dediĉita al la kunlaboro kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kun kiu SEU, pretendante esti la ĉefa organizo de la komunistoj, finfine rompis pro ideologiaj kvereloj, kiuj tiam furoris en la internacia movado de la Maldekstro.

Tiuj kvereloj finfine skismigis la komunistan-laboristan movadon laŭ la okcidenta kaj la sovetia vojoj kaj malproksimigis la du ĉeforganizaĵojn de la veraj taskoj, kiujn ili devintus plenumi, nome disvastigi Esperanton inter proletoj, komunistoj, laboristoj, kamparanoj ktp.

Sed malgraŭ tiuj akraj ideologiaj disputoj ili tion ja sendube faris, kiel montras kelkaj nombroj: en 1935 SEU kulmine nombris entute 14 237 membrojn, de kiuj 5 111 estis esperantistoj, poste la nombroj ŝrumpis.

Pri la cirkonstancoj de la aresto kaj mortigo de Drezen kaj aliaj aktivuloj la

leganto ne fariĝas informita. Anstataŭ inkluzivi detalajn biografiojn kaj dokumentojn pri la verdiktoj kontraŭ Drezen kaj aliaj mortkondamnitaj esperantistoj, Krasnikov aldonis leteron de Grigorij Demidjuk, kiu rilate la stalinismajn fifarojn ne raportas pli multe ol ke li mem estis deportita al Siberio kaj plene rehonorigita en 1955.

Laborista movado kaj germania-soveta kunlaboro

La duan parton de la libro konsistigas tri artikoloj de la (orient-)germana esperantisto/-logo Detlev Blanke, kiuj jam aperis en Esperanto: *Historio de la laborista Esperanto-movado* (en *Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapeŝto 1978), *Historio de la Eldona kooperativo de la revolucia Esperanto-literaturo EKRELO* (en *Impeto '91*, Moskvo 1991) kaj *Esperanto kaj socialismo* (Aparta eldono: Novjorko 2004).

Esperanto kaj socialismo

En la enkonduketoj por la ruslingva eldono, Blanke raportas, kial li ekinteresiĝis pri la laborista kaj sovetia Esperanto-movadoj, kie li renkontis multajn kuraĝajn personecojn, kiuj sindone agadis sub riskoplenaj kondiĉoj, kaj kiuj tial estas alte estimindaj. Blanke ankaŭ atentigas, ke liaj artikoloj ne estas plene objektivaj, kvankam li strebas al objektiveco.

La plusoj kaj minusoj pri la Esperanto-movado, kiuj estas listigitaj de Blanke kaj kiuj validas pli malpli por ĉiuj ekssocialismaj landoj, estas konsiderablaj kaj diskutindaj.

Ekzemple, Walter Ŝelazny (*La Ondo de Esperanto*, 2005, №11) kritikis, ke la kriterioj de Blanke respogulus sole la vidpunkton de pli altranga ŝtatafunkciulo, kiu estis respondeca pri Esperanto. Do necesus priskribi aliajn problemojn, kiujn la soclandaj Esperanto-asocioj alfrontis.

Ankaŭ pri MEM oni donas tro belan bildon, forgesante, ke la percepto de la “okcidento” fare de tiu poststalinisma pseŭdopac-organizaĵo, kiu plumpaĉe ŝatis ludi “malvarman militon”, estis treege unuflankeca kaj neobjektiva.

Kvankam Blanke montras sin sciencisto aperta al objektiva kaj celdirektita prilaborado de la historio de la orienteŭropa Esperanto-movado dum la real-socialismo, li ne povas kaj ne volas akcepti provojn nigrepentri aŭ eĉ falsiĝin fare de personoj, kiuj ne partoprenis

tiun movadon, nek vivis en tiuj landoj. Kiel ekzemplon li indikas en piednoto artikolon de Markus Sikosek pri la Esperanto-movado en GDR (*La Ondo de Esperanto*, 1999, №2) kaj kiu, laŭ Blanke, estis maltaŭga kontribuado de nekompetentulo.

Do, eĉ se Blanke alergie reagas al tiaj publikigoj, la historie kaj sociologie unika fenomeno de la fermitaj komunistaj socioj en orienta Eŭropo, en kiuj ankaŭ la Esperanto-movado ludis ian rolon, koncernas sendube kaj orientanojn kaj okcidentanojn, ankaŭ nin esperantistojn.

Reskribado de la historio ne necesas — ĉu vere?

Nun baldaŭ 20 jarojn post la politika turniĝo en orienta Eŭropo necesus repripensi siajn vidpunktojn, admonas Blanke, kiu povas spiri pli libere ol en GDR. Sed malgraŭ novaj ekonoj, laŭ li, ne ekzistas la bezono reskribi alimaniere la historion de la laborista Esperanto-movado (LEM); sekve li decidis ne fari tion, ĉar la teksto aperis en tempo, kiu respogulus konkretajn vidpunktojn, de kiuj Blanke eĉ ne deziras distanciĝi, egale ĉu ili estis eraraj aŭ ne.

Samtempe Blanke konfesas, ke li prezentis la historion de SAT iom unuflankece, precipe sub la influo de la komunisma teoriorientiĝo, kaj tial li taksas ilin ne sufiĉe objektivaj. “Hodiaŭ ni scias, ke ankaŭ en la komunismaj cirkloj estis faritaj grandegaj eraroj”, — skribas Blanke.

La modesta eldonkvanto (nur 400 ekzempleroj) de la libro bizare memorigas la drastan papermankon, kiu regis en Sovetunio dum la tempo de SEU, pri kio ĝiaj estroj lamentadis. Kaj malgraŭ tiu ege malalta eldonkvanto kaj malgraŭ la evidente modesta intereso de esperantistoj pri sia propra historio, mi esperas, ke la leginda libro, kiu direktiĝas unuavice al ruslingva celpubliko, kiu interesiĝas pri sociologio kaj historio (sic), atingos sian legantaron inter la 142 milionoj da ruslandanoj!

Andreas Künzli



Roterdamaj furorlistoj

Gazetara Komunikado de UEA sciigis, ke la vendoj de la Libroservo de UEA dum 2007 sumiĝis je 121 172 eŭroj. Kompare kun la bona jaro 2006 okazis malkresko de 12 747 eŭroj pro la tradicie malpli bona debito de la kongresa libroservo, kiam UK okazas ekster Eŭropo. La Libroservo de UEA vendis entute 2214 diversajn titolojn.

UEA diskonigis du listojn. Tiun de totalaj vendoj influas kvantaj mendoj de aliaj libroservoj por la eldonaĵoj de UEA, kaj ĝi enhavas 11 eldonaĵojn de UEA/TEJO. La alia listo dokumentas unuekzemplerajn vendojn al individuaj klientoj poŝte aŭ surloke en Roterdamo. La vendoj en la kongresa libroservo estas enkalkulitaj en la statistiko de ĉiuj vendoj.

La statistiko de UEA malsimilas al la nacilingvaj furorlistoj: en la du dudeklibraj listoj estas plejparte lernolibroj, vortaroj kaj libroj pri Esperanto. Neniu romano, neniu novelaro... La sola beletraĵo, *Beletra Almanako*, enhavas ne nur beletron.

Vendoj entute

<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> , B. Kolker* (EUR 18,00)	295
<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj* (EUR 15,00)	276
<i>Vivo de Zamenhof</i> , E. Privat* (EUR 9,00)	245
<i>Lingvo kaj popolo</i> , H. Tonkin* (EUR 14,10)	232
<i>Esperanto per rekta metodo</i> , S. Marček (EUR 8,10)	179
<i>Afero de espero</i> , H. Goes* (EUR 9,00)	138
<i>Saluton!</i> A. Childs-Mee* (EUR 10,80)	137
<i>Internacia Kongresa Universitato 2007</i> , red. A. Wandel* (EUR 12,00)	113
<i>Esperanto elektronike</i> , komputila DVD (EUR 9,00)	111
<i>Gerda malaperis!</i> , C. Piron (EUR 5,70)	109
<i>La Komuna Eŭropa Referenckadro</i> , div. aŭtoroj* (EUR 3,00)	99
<i>Vikipedio. Praktika manlibro</i> , red. Y. Nevelsteen (EUR 3,00)	99
<i>Historio por malfermi estontecon</i> , div. aŭtoroj (EUR 15,00)	90
<i>Pocket Esperanto Dictionary</i> , A. McInlinen* (EUR 15,00)	89
<i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i> , H. Amery (EUR 12,00)	84
<i>Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon</i> , S. Marček (EUR 7,50)	74
<i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> , B. Wennergren (EUR 27,00)	73
<i>Japanio kalejdoskope</i> , div. aŭtoroj (EUR 5,40)	72
<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton* (EUR 13,80)	66
<i>Konciza etimologia vortaro</i> , A. Cherpillod* (EUR 21,60)	55

Vendoj unuopaj

<i>Lingvo kaj popolo</i> , H. Tonkin* (EUR 14,10)	44
<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj* (EUR 15,00)	43
<i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> , B. Wennergren (EUR 27,00)	40
<i>Beletra Almanako 1</i> (EUR 10,50)	34
<i>Vivo de Zamenhof</i> , E. Privat* (EUR 9,00)	33
<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005</i> (EUR 87,00)	27
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> , B. Kolker* (EUR 18,00)	27
<i>Esperanto per rekta metodo</i> , S. Marček (EUR 8,10)	26
<i>Konciza etimologia vortaro</i> , A. Cherpillod* (EUR 21,60)	25
<i>Afero de espero</i> , H. Goes* (EUR 9,00)	25
<i>Informado praktike</i> , Z. van Dijk (EUR 15,00)	24
<i>Biblio</i> (EUR 20,10)	22
<i>Esperanto elektronike</i> , komputila DVD (EUR 9,00)	20
<i>Vikipedio. Praktika manlibro</i> , red. Y. Nevelsteen (EUR 3,00)	20
<i>Historio de Esperanto</i> , A. Korĵenkov (EUR 12,00)	19
<i>Relativeco per bildoj</i> , W. Atkinson (EUR 9,30)	19
<i>La Komuna Eŭropa Referenckadro</i> , div. aŭtoroj* (EUR 3,00)	19
<i>La bona lingvo</i> , C. Piron (EUR 13,50)	17
<i>2 paroladoj de Ivo Lapenna</i> , vol. V, KD (EUR 13,50)	17
<i>Esperanto kaj lingva diverseco</i> , C. Hagège & F. Lo Giacomo* (EUR 2,70)	17

* Eldonaĵo de UEA/TEJO. La prezoj estas aktualaj nerabatitaj vendoprezoj.

Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervojisto, 2008/1; Esperanta Finnlando, 2008/1; Esperanto USA, 2008/1; Esperanto aktuel, 2008/1; Generala Informilo, 2008/147; Heroldo de Esperanto, 2007/17, 2008/1,2; Informa Bulteno, 2008/1; Kataluna Esperantisto, 2007/344; Kontakto, 2007/6; La Movado, 2008/683,684; La Ondo de Esperanto, 2008/3; La Revuo Orienta, 2008/1; La Sago, 2008/41; Le Monde de l'Espéranto, 2008/565; Literatura Foiro, 2008/231; Litova Stelo, 2008/1; Lumo, 2007/2; Monato, 2008/3; Norvega Esperantisto, 2008/1; Okazas, 2008/565; Sennaciulo, 2008/1-2; Service de Presse, 2008/41; Spegulo, 2008/1; Vekilo, 2008/1.

ILARO

Antaŭ kvin jaroj ni starigis fondaĵon *Ilaro*, danke al kiu estis modernigita la aparaturo de *La Ondo / Sezonoj*. Sed post kelkaj jaroj da intensa uzado ni havas multajn teknikajn problemojn, kiuj endanĝerigas pluan produktadon de niaj *Ondo*j, libroj kaj sonprogramoj.

Ni do decidis lanĉi novan kvestokampanjon, sed antaŭ la lanĉo ni ricevis telefonvokon de Roger Siarri el Korsiko. Aŭskultinte niajn unuajn podkastojn, li entuziasmiĝis kaj kontribuis al evoluigo de nia teknika bazo per 150-eŭra donaco. Lian donacon ni menciis podkaste, kaj baldaŭ venis informo pri donaco de Pedro Zurita el Hispanio. Dankon al ili!

Ilaro restariĝis, kaj ĝi donas esperon, ke nia estonteco, en la teknika aspekto, estos garantiita por kelkaj pliaj jaroj.

Ruslandanoj sendu donacojn poŝte (al nia redakcia adreso je la nomo de Галина Романовна Горецкая) aŭ banke (petu informojn pri la konto). Alilandaj donacoj estas bonvenaj ĉe nia UEA-konto avko-u. En *La Ondo* aperos la nomoj de la donacintoj.

Antaŭdankon por via helpo!

ABONHELPO

En 2008 danke al nia Abonhela Fondaĵo *La Ondon* legadas rekorde multaj 21 gesamideanoj el 15 landoj — Armenio (1), Barato (1), Benino (1), Bosnio kaj Hercegovino (1), Brazilo (1), Ĉinio (1), Finnlando (1), Kosta-Riko (1), Malajzio (1), Moldavio/Dnestrio (1), Nederlando (1), Rumanio (1), Ruslando (7), Uzbekistano (1), Zimbabvo (1).

Kelkaj donacintoj indikis la personojn kaj landojn, ekzemple, nia siberia amiko, kiu pagis sep abonojn por neriĉaj aŭ emeritaj ruslandaj esperantistoj. Aliaj lasis la elekton al la redakcio.

Koran dankon!

Halina

Aleksander

Monato
INTERNACIA MAGAZINO DE ENDEPERIA

La mondo ĝas por vi malpli kosta!

Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon MONATO dum 3 monatoj senpage.

Por pliaj informoj kaj kondiĉoj vizitu: www.monato.net


aŭ skribu al MONATO
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140
B-2000 ANTWERPEN, BELGIO
FAXSE: +32 3 233 54 33
RETE: MONATO@FEL.ESPERANTO.BE

Por la februara *Oblikva Krucvortenigmo* venis 17 respondoj (nur du malĝustaj). Por la demando 8 (tabulludo por du personoj) estas akceptitaj kiel ĝustaj la respondoj *damoj* kaj *ŝakoj*, sed ne *karoo*. La ĝustajn respondojn sendis: Andrej Kirienko (Belorusio), Edmund Grimley Evans, Malkolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jaume Armengol Doménech, Pere Palá (Hispanio), Petras Čeliaskas (Litovio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt, Esperanto-klubo Olsztyn, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Svetlana Konjašova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La ĝustaj respondoj: 1. silicio; 2. hieno; 3. sanatorio; 4. sagitario; 5. lamao; 6. kanario; 7. Ankar'; 8. damoj (=ŝakoj); 9. virgulino; 10. nitrogeno; 11. agraf'; 12. ĝangalo; 13. Tajland' (=Danland'); 14. krono; 15. faŭno; 16. onklo.

La loto donis libropremion al *Edmund Grimley Evans*. Ni gratulas lin!

Nur radikoj



Horizontale: 1. grandegul'. 2. agrabl'. 3. senverdaĵej'. 4. laktosuk'. 5. akvoflu'. 6. municier'. 7. ŝarĝaj'. 8. fruktarbust'. 9. militdefendaj'. 10. hejmvestaj'.

Vertikale: 1. ĉasleopard'. 12. flueg'. 2. laŭb'. 14. konsciencriproĉ'. 15. ventet'. 16. tegmenter'. 6. bredad'. 18. partaj'. 7. palis'. 20. volviĝ'.

Oblikve: de 18 al 4: kapuj'.

Uzendas nur radikoj. Kiel solvon skribu kiom da literoj "g", "t", "z" kaj "l" troviĝas en la solvita krucenigmo. Via respondo venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de majo.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

El la juda humuro

Juna judo kaj juna gojino (katolika) enamiĝis kaj decidis geedziĝi. Sed ŝiaj gepatroj starigis kondiĉon: ke la juna kandidato unue kristaniĝu. La amanta junulo decidis esplori la aferon kaj aliĝis al kurso pri la kristana religio. Post du monatoj da profunda studado la junulino revenas hejmen ploregante.

Gepatroj: Kio okazis? Ĉu la kristana religio ne plaĉis al li?

Junulino: Male, ĝi tro plaĉis al li. Ĝi tiom plaĉis al li, ke li decidis fariĝi katolika pastro.

Josef Shemer (Israelo)

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Pli bone ne sali, ol sali tro multe, aŭ: Marksismo kun siaspeca spico

... se la nacia produkto estis antaŭ la salaroaltiĝo varia kaj ne fiksa... (Karlo Markso. *Salajro, prezo kaj profito*. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2007, ĉap. 1; rimarkis Ionel Oneț)

Hondra nombro morti, UEA kondulunci

D-ro Yamazoe forpapsi... la 15an de januaro 2007 en la aĝo de 98-jaroj. (Renato Corsetti, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/10840>, 16 jan 2007)

Poŝporta servo?

Esperanto-Asocio de Finnlando... decidis ŝanĝi la retadreson de sia organo... pro tro multaj ricevitaĵ rubpoŝoj. (Tiina Oittinen, 13 mar 2008, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/12165>; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

Poŝverka servo?

Verkisto sur poŝmarko en Hungario (Jarraporto de Esperantlingva Verkista Asocio 2005–2006, Spomenka Štimec, <http://www.everk.it/index.php?id=20,136,0,0,1,0>)

Zamen... Zamen... Zamenkoffi?

De la 24a ĝis la 31a de decembro 2007... Unue estis festo en Instituto Zamengof, kaj poste, sekvis la 15a TEK. Fermiĝis la jaro per spontana kolektiĝo de Esperantistoj en Instituto Zamenfok preskaŭ nur por babili. (Gbeglo Koffi, <http://groups.yahoo.com/group/individujaj-membroj/message/734>, 31 dec 2007)

Orientiĝu kongreslanden

Nederlando situas en la orienta parto de la Mez-Eŭropa ebena, kie la riveroj Rejno, Maaso kaj Ŝeldo en la Nordan maron. (*Scienco kaj Kulturo*, 2007, №1, pĝ. 36; rimarkis Ionel Oneț)

Kaj rapide kreskas la ilaro

La renkontiĝo finiĝis per komuna kantado de ILa Espero. (*La Ondo de Esperanto*, 2006, №12, pĝ. 8; notis Edmund Grimley Evans)

Plukis **István Ertl**

Dokito (Brazilo)

La Ondo de Esperanto

*La Ondo de Esperanto — jen Revuo,
Kiun ĉiumonate mi ricevas!...
Donaco belkolora, kiun devas
Kun intereso legi kaj sen bruo.*

*Ĝi estas kun certeco evoluo
De la Movado, kiu neniam krevas,
Pri kiu la esperantistoj revas,
Kaj amas kaj deziras sen enuo...*

*L' Ondo de Esperant' en mia mano...
Ĝi venas tra l' giganta oceano,
Celanta la grandecon de l' estonto.*

*Ni devas ĝin kultivi kun persisto,
Kun amo kaj kareso de la Kristo,
En tiu Predikado sur la Monto!...*



Korajn gratulojn kaj bondezirojn ni direktas al la respondeca sekretario de Litova Esperanto-Asocio **Irena Alijošutė**, kiu festis sian jubileon la 17an de marto en Vilno! (Foto de *Antanas Gincevičius*)

Ni kore gratulas nian pollandan kunlaboranton **Zbigniew Galor** okaze de lia habilitiĝo la 19an de februaro en la Sociscienca Fakultato de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznań) kaj deziras al li sukcesojn en lia laboro en la Altlernejo pri Humanismaj Sciencoj kaj Ĵurnalismo, kie li ricevis profesoran postenon.

La Ondo

Esperanto-kastelo invitias

Ĉiu staĝo en la kastelo Grezijono daŭras unu semajnon, de sabato vespere ĝis la sekvanta sabato tagmeze; la kursoj okazas de dimanĉo matene ĝis vendredo vespere.

Eblas elekti unu aŭ plurajn semajnojn inter la 5a de julio ĝis la 16a de aŭgusto 2008.

Disponeblas tri gradoj: por komencantoj, por progresantoj kaj por praktikantoj. Cetere eblas praktiki diversajn aktivaĵojn (AA) laŭ la semajnoj. Vidu ĉi-sube por la detaloj.

5–12 jul 2008. 1a grado: Steve Wagenseller (Usono): filmo-serio *Pasporto al la Tuta Mondo*, vi ludos, studos, aktoros kaj ridos. 2a grado: Michel Dechy (Francio): Tinĉjo kiel lerno-libro + kanzonoj + rolludoj. 3a grado: Serge Sire (Francio): farado de bild-rakontoj. AA: Franjo Lévêque-Provost (Francio): kantado: nuntempaj kantoj + eblaj individuaj kursetoj pri voĉ-laboro (eĉ por komencantoj)

12–19 jul 2008. 1a grado: Steve Wagenseller (Usono): filmo-serio *Pasporto al la Tuta Mondo*, vi ludos, studos, aktoros kaj ridos. 2a grado: Jean-Luc Kristos (Francio): simpla, parola komunikado ĉiutaga en etoso ĝoja, ludema kaj feriema. 3a grado: Renée Triolle (Francio): preparado al la Ekzameno de Tria Nivelo. AA: Franjo Lévêque-Provost/Jean-Luc Kristos (Francio): kantu dancu! / Elizabeth Gury-Oberthur (Francio): malstreĉiga pied-masaĝado

19–26 jul 2008. 1a grado: anoncota. 2a grado: Jean-Luc Kristos (Francio): simpla, parola komunikado ĉiutaga en etoso ĝoja, ludema kaj feriema. 3a grado: André Cherpillod (Francio): supera gramatiko kaj literatura tradukado. AA: Marie-France Ménanteau (Francio): pentrado kaj desegnado

2–9 aŭg 2008. 1a grado: Bertrand Gilet (Francio): duonrekta metodo. 2a grado: Gražina Opulskienė (Litovio): fabeloj diversspecaj por paroligi vin. 3a grado: Aurora Bute (Rumanio): komentado de tekstoj, gramatiko, paroligado. AA: Nina Korĵenevskaja (Francio): teatro / Brigitte Bourdet (Francio): pentrado sur objektoj

9–16 aŭg 2008. 1a grado: Rafael Mateos (Hispanio): lernu Esperanton per ludoj. 2a grado: Sorin Porupca (Rumanio): paroliga kurso per vigla metodo. 3a grado: Christian Rivière (Francio): tradukado, verkado, lingva analizo. AA: Doina Greavu, Sorin Porupca (Rumanio): malkovru malnovajn aziajn sanmetodojn / Christian Rivière (Francio): Goludo

Informojn pri la prezoj kaj aliĝilojn petu rete aŭ poŝte.

✉ Kulturdomo de Esperanto Kastelo Grezijono 49150 Bauge, Francio


☎ +33 (0)2 41 89 10 34

✉ kastelo@gresillon.org

<http://gresillon.org>



Koreio. Korea esperantistino Feliĉa (Esperanta nomo) instruis al siaj pliaĝaj fratinoj Esperanton. Feliĉa estas estrano de Korea Esperanto-Asocio kaj agadas aktive por nia movado. Nun ŝi kun siaj fratinoj praktikas la lingvon kaj revas pri vojaĝo tra la mondo kaj pri renkontiĝoj kun multaj bonaj esperantistoj. Iliaj ŝatokupoj estas variaj, nome kuirado, korea tradicia danco, kanto kaj ludo de mandolino. Probable vi renkontus ilin en la mondo. (Hong Sunĝoĉo)



Ĉinio. Ĉi tiu kaligrafia gratulo al la centjariĝo de UEA, preparita en marto en Tianjin-a Esperanto-Asocio (vd. pĝ. 8), nun vojaĝas tra Ĉinio subskribate de lokaj aktivuloj. (Wei Shan)



Nepalo. Plenplena estis la ĉambro en la eduka centro Valley (vd. pĝ. 6), kiam grupo da nepalaj esperantistoj prezentis Esperanton. Supozeble, multaj el la fotitoj jam eklernis la lingvon. (Bharat Kumar Ghimire)



Gediminas Kazlauskas. "Espero vivi" (laūda mencio en la 10a Internacia Fotokonkurso)